Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 18 **Trimonata** **jan.-mar. 1989**

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

REDAKTA KOMITATO

Carlevaro, T. (CH)
Formizzi, G. (I)
Lins, U. (D)
Ludwig, E. (F)
Maitzen, M. (A)
Mallia, C. (M)
Mizuno, Y. (J)
Szerdahelyi I. (H)

Redaktisto: István Ertl, Universitato ELTE, Budapest
Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK
H-1364 Budapest, Pf. 107
☎ 36 1 180 966/185

Presado: Grafika Centro Antverpeno,
Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

Symoens E. – Laborplano de ILEI (1989-1991) 1
MacGill, S. – Ni kaj la strategio (pri la laborplano de UEA) 8
Manceau, J. – Ludoj por komencantoj 14
Barcsay, Zs. – 7a Internacia Metodika Seminario 17
Leteroj de legantoj 21
Recenzoj 23
AG-Agado (nova projekto en Hispanio) 27
Konferenco de ILEI en 1990 28
Rezultoj de la enketo pri instruado de Esperanto 29
Akademio Internacia de la Sciencoj 35

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Heide (Kalmthout); tel. (03)666.62.66 — Kunordigado, informado en pedagogiaj medioj. rilatoj kun Unesko kaj UEA.

Vicprezidanto : Stefan MacGill, Zsókavár ut. 46 IX 36, H-1157 Budapest; tel. (1) 564-093 aŭ 563-659 — Internaciaj ekzamenoj kaj iliaj kursoj, statistikado de instruado, internaciaj lerniloj, lerneja projekto, IPR.

Ĝen. Sekretario : Audrey Childs-Mee, Postbus 25041, NL-3001 HA Rotterdam; tel. (010)425.4625 — Rilatoj kun sekcioj, membroj kaj kun UEA. Internaciaj korespondaj kursoj. Pedagogia prizorgo de infanaj kongresetoj de UEA.

Kasisto : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby; tel. (0415)-501 52 — Financaj rilatoj kun sekcioj, konferenco, k.a.

Vicsekretario : Malcolm Jones, 41 Causeway, GB-SN 15 3DD Chippenham; tel. (0249) 656041 — Venonta konferenco, lernejana korespondado, unuecigo de naciaj ekzamen-sistemoj.

Membroj : Till Dahlenburg, Str. der DSF 13, DDR-2722 Brüel; tel. (09-8576)-528 — Gvido de pedagogia komisiono, internaciaj ekzamenoj, metodikaj kursoj.

Jarkolekto 19 **jan.-mar. 1988** **N-ro 1, 1989**

«Internacia Pedagogia Revuo» estas sendependa forumo de la tutmonda pedagogaro. Ĝi aperas kvarfoje jare. La redakta komitato rajtigas sin mallongigi aŭ korekti la manuskriptojn nur laŭ lingvaj vidpunktoj. Manuskriptojn ni ne resendas. Reproduktaĵoj, tradukaĵoj estas permesataj, eĉ rekomendataj, kune kun fontindiko.

LABORPLANO de ILEI (1989-1991)

ENKONDUKO

Laborplano estu pli ol nura elnombrado de farendaĵoj. Ĝi ankaŭ enhavu revuon de ĉiuj celoj kaj celeroj de nia asocio, el kiuj ni devas elekti, ofte laŭ la cirkonstancoj kaj la ebloj, kelkajn prioritatojn, kaj samtempe proponi rimedojn – homajn kaj materiajn –, necesajn por realigi la diversajn programerojn. Ĝi enhavu sugestojn pri strategio kaj metodo, disdivido de la taskoj. Plano estas orientigilo, gvidilo. Ĝi ne estas rigida, tamen la grandaj decidoj kaj datoj estu respektataj. Pro la rapide evoluantaj sociaj, politikaj kaj ekonomiaj cirkonstancoj kaj pro la granda diverseco de la geografiaj bezonoj kaj situacioj, la plano estu adaptebla al novaj, neantaŭvideblaj situacioj. Pro tio ni ĉiuj, estraranoj kaj membroj ĉie en la mondo, estu atentaj pri favoraj cirkonstancoj por agi. Nur tiel eblas realigi almenaŭ parton de niaj belaj intencoj.

STRATEGIO

Se ni konsentas, ke la fina celo de la Esperanto-movado estas la ĝeneraligita uzo de Esperanto kiel internacia dua lingvo, ni provos listigi ĉiujn konstituantajn elementojn necesajn por atingi tiun celon. Laŭ ni, la baza donitaĵo estas: sen oficiala instruado de Esperanto en la lernejoj de pluraj landoj samtempe, ne eblos iam atingi tiun celon, certe ne per la nun aplikataj labormetodoj.

La eventuala enkonduko de Esperanto en la lernejojn samtempe, devige aŭ libervole, okazos nur pere de leĝaj aranĝoj en tiuj landoj samtempe. Tio verŝajne eblos nur post rekomendo de iu internacia organizo (UNESKO, UN, Eŭropa Komisiono/Parlamento k. a.) al la membro-ŝtatoj.

Tio implicas siavice, ke tiuj internaciaj organizoj, same kiel la naciaj registaroj/parlamentoj, funde kaj daŭre estu informataj pri Esperanto laŭ realismaj, modernaj, adaptitaj strategio kaj argumentado. Tiu informado estu unu el

la prioritataj taskoj kaj okupoj de ILEI (kaj UEA), ĉar sen sisteme funkcianta larĝskala kaj profesie gvidata informado en ĉiuj respondecaj kaj decidpovaj pedagogiaj medioj, ni NENIAM atingos nian celon. Paralele kaj samtempe kun tiu informado, necesas prepari la homan kaj materian infrastrukturon por apogi kaj kompletigi la informan laboron kaj esti pretaj, se iam, kontraŭ ĉies atento, iu instanco faros unuan paŝon en la de ni esperatan direkton!

LA ROLO DE ILEI

1. ILEI ne estas celo en si mem. Kiel faka asocio, ĝi estas peranto, kunordiganto kaj inspiranto por la fina celo. Laŭ art. 732 de la Strategia Plano de UEA, ILEI estas "...ĝia ĉefa konsilanto kaj plenumanto sur la tereno de instruado de Esperanto."

Sed, por ludi efike tiun rolon, ILEI devas

- esti *forta* asocio, kun plej multaj aktivaj membroj en plej multaj landoj. La kvanto ja gravas por influi oficialajn instancojn kaj fortigi la financan bazon de la asocio;
- esti kiel eble plej *prestiĝa* dank' al sia profesieco, seriozeco kaj internacieco por akceptigi sin en neesperantistaj profesiaj kaj politikaj medioj. La kvalito ankaŭ gravas!
- funkcii *efike kaj harmonie*, surbaze de strikta disdivido de taskoj laŭ ĉies specialeco kaj engaĝiteco;

La *interna forto kaj organizeco*, funkciado kaj kohero ja estas nepraj antaŭkondiĉoj por agi eksteren kaj realigi la proponitajn celojn.

2. La plej gravaj taskoj de ILEI estas

- profesie kaj sciencnivele pristudi ĉiujn problemojn, internajn kaj eksterajn, rilate al la instruado de internacia lingvo;
- ellabori kaj produkti diverstipajn internaciajn instruprogramojn, regularojn, ekzamensistemojn, postularojn, praktikajn dokumentojn rilate al Esperanto-instruado;
- pristudi kaj produkti didaktikan materialon kaj fiksi normojn, kriteriojn, laŭ kiuj aliaj instancoj, precipe naciaj, povos realigi adaptitan materialon;
- pliperfektigi kaj eduki la instruistaron laŭ konvenaj metodoj kaj rimedoj;
- organizi kaj iniciati diversajn pedagogiajn eksperimentojn;
- kunordigi kaj stimuli la pedagogian laboron en ĉiuj landoj, en kiuj ĝi disponas pri aktivaj membroj;
- kunlabori kun la Terminologia Esperanto-Centro (TEC) de UEA por ellabori internacian pedagogian terminaron;
- kunlabori en la Fonduso Zamenhof en Bjalistoko;

- kunlabori en la Fondaĵo Azio;
- kontroli la nivelon de la ekzamenoj, kiuj eventuale estos organizataj laŭ la Internacia Unueca Ekzamensistemo.

3. *La plej gravaj rimedoj, pri kiuj ILEI devas disponi, estas*

a, *homaj*

- kerno de entuziasmaj, respondecaj, kapablaj kaj organizemaj homoj por gvidi kaj kunordigi internaciskale la diversajn taskojn de la laborplano;
- aro da naciaj – fidindaj kaj agemaj – kunlaborantoj, kapablaj agi en teamoj laŭplane;
- aktivuloj por agi, laŭ konkretaj interkonsentoj, kun ĉiuj ekzistantaj Esperanto-asocioj, Centroj, Institutoj (AIS, TEC, k.a.) kaj aranĝoj (IMS, SIS k.a.);
- internacia teamo de spertaj geinstruistoj por eduki gekolegojn laŭ la instrurajtiga programo de ILEI;
- internacia teamo por organizi vastajn informkampanjojn en ĉiuj pedagogiaj medioj;
- aktivuloj por agi en la diversaj komisionoj de ILEI (statistiko, didaktikaj ludoj k. a.);
- aktivuloj por organizi en ekzistantaj Centroj ekzamenojn pri lingvokono laŭ la Internaciaj Ekzmenoj de ILEI/UEA;
- spertaj kunlaborantoj por verki lernolibrojn, programojn, produkti didaktikan materialon, organizi rapidkursojn, agi en la perkoresponda kurso internacia, kiun ILEI intencas verki.

Rimarko: per aparta alvokilo ILEI klopodas kolekti nomojn de kunlaborantoj tra la mondo.

b, *materiaj*

- sanaj financoj, kiuj fontas el kotizoj, donacoj, subvencioj, heredaĵoj ktp.;
- valoraj informiloj kaj kontaktiloj kiel IPR, intertempa informbulteno, faldfolioj, broŝuroj k. s.;
- Centra Sekretariejo kun konstanta adreso kaj ejaro por arkivoj, biblioteko, dokumentado ktp.;
- materialo por prezenti al esperantistaj instruistoj informojn pri mondaj problemoj, mondaj institucioj ktp. pere de Esperanto;
- propra eldona fako por publikigi lernolibrojn, programojn, informbroŝurojn, metodologiajn kaj didaktikajn verkojn ktp.

c, *pedagogiaj*

- seminarioj, studtagoj, kolokvoj, kongresoj k. s. por sciencnivele pristudi ĉiujn problemojn rilate al la realigo de niaj pedagogiaj taskoj;
- verkado de universitataj kaj altlernejaj disertacioj kaj tezoj pri la instruproblemaro de Esperanto;
- profesiaj eldonaĵoj pri pedagogio, metodologio, didaktiko, kursgvidado..

LA ROLO DE LANDAJ, REGIONAJ, LOKAJ ASOCIOJ KAJ GRUPOJ

- organizi Esperanto-lingvokursojn je diversaj niveloj en ĉiuj lokoj kie tio eblas, ĉu laŭ propraj programoj kaj regularoj, ĉu laŭ la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA;
- organizi, kunlabore kun ILEI, instru-rajtigajn kursojn kaj ekzamenojn por geinstruantoj kaj -istoj;
- kolekti informojn naciskale pri
  - ĉiuj oficialaj iniciatoj je ĉiuj niveloj rilate al Esperanto-instruado;
  - ĉiuj Esperanto-kursoj, kiaj ajn, je ĉiu nivelo;
  - ĉiuj altrangaj, prestiĝaj, influriĉaj personoj, kiuj iamaniere favoras Esperanton

kaj komuniki la kolektitajn informojn al la koncernaj respondeculoj de ILEI;
- kunlabori en translimaj informkampanjoj organizitaj de ILEI en pedagogiaj medioj;
- produkti adaptitajn lernilojn en kunlaboro kun la koncerna servo de ILEI;
- ĝenerale, informi ILEI (ĉu la prezidanton, ĉu la ĝeneralan sekretarion) pri ĉiuj iniciatoj rilate al la instruado de Esperanto;
- verki artikolojn por IPR.

ILEI KAJ UEA


Art. 732 de la Strategia Plano de UEA:
"UEA fortigos siajn rilatojn kun ILEI, kiu restos ĝia ĉefa konsilanto kaj plenumanto sur la tereno de instruado de Esperanto. La du organizaĵoj ellaboros komunan agadplanon kaj UEA buĝetos specifan sumon por akceli la evoluigon de bonaj lerniloj por Esperanto."

ILEI organizas la Tagon de la Lernejo kaj la Internaciajn Ekzamenojn dum la Universalaj Kongresoj de UEA; uzas, se necese, la infrastrukturon de UEA por realigi siajn celojn; kunlaboras, sur sia tereno, en la nova centro en Bjalistoko. Kompense, UEA povas subvencii plurajn aktivecojn de ILEI post interkonsento.

LAŬJARA PLANADO

Ĝis aŭgusto 1989

- Aperigi 4 numerojn de IPR en la jaro anstataŭ 3.
- Okazigi sesiojn de la Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI ekster la UK kaj aperigi klarigan libreton pri la ekzamenoj.
- Trakti la dosieron "Internacia Unueca Ekzamensistemo pri lingvokono je la elementa, meza kaj supera niveloj".
- Organizi la duan Internacian Pedagogian-Metodikan kurson en La Chaux-de-Fonds (10-22 de julio 1989); instrurajtiga kurso.
- Organizi la unuan Seminarion Internacian pri lingvo-didaktiko en La Chaux-de-Fonds (23-27 de julio 1989).



- Finpretigi la materialon verkitan de Irena Szanser por la instru-rajtiga kurso.
- Pristudi la eblojn starigi propran eldonfakon de ILEI (materialo por informado en pedagogiaj medioj, lernolibroj, instrumaterialo, programoj, pedagogiaj, didaktikaj kaj metodologiaj verkoj).
- Partopreni en la Internacia Metodologia Seminario en Poprád.
- Partopreni en la Internacia Kongreso en Nijmegen (NL) 1989, organizota de la Eŭropa Instruista Asocio pri la temo "Esti Eŭropa instruisto".
- Starigi Terminologian Komisionon, fiksi la labormetodon kaj -strategion.
- Prepari vastan kampanjon pri informado en pedagogiaj medioj, i.a. en la Eŭropa Komunumo (forigo de la landlimoj en la Komunumo ekde 1992 kaj senlimaj kontaktoj inter la Eŭropaj civitanoj).
- Daŭrigo de la interna plifortigo de la Ligo, starigo de novaj sekcioj, nomado de novaj reprezentantoj.
- Organizi kampanjon por pligrandigi la financajn rimedojn laŭ koheraj plano kaj strategio.

Ĝis aŭgusto 1990

- Aperigi, krom IPR, jare po 4 numerojn de Informbulteno.
- Eldoni la kompletan dosieron pri Internaciaj Unuecaj Ekzamenoj.
- Organizi, laŭ tiu sistemo, en diversaj partoj de la mondo, ekzamenojn laŭ la lokaj ebloj kaj preteco.
- Organizi la Trian Internacian Pedagogian-Metodikan Kurson en La Chaux-de-Fonds kaj eble en aliaj lokoj, laŭ la surlokaj ebloj kaj garantioj pri kapableco kaj seriozeco.
- Organizi, se la unua sukcesos, duan Seminarion Internacian pri lingvodidaktiko.
- Eldoni la koncernajn kursmaterialojn.
- Daŭrigi la eldonprojekton de pedagogiaj verkoj.
- Ellabori, krom la Internaciaj Ekzamenoj, rapidkurson kaj perkorespondan kurson.
- Daŭrigi la kampanjojn pri interna plifortigo kaj pri ekstera informado en pedagogiaj medioj.

PERSONE DIFINITAJ TASKOJ POR 1989

STEFAN MACGILL
enpaĝigos IPR, kompilos statistikon pri E-instruado en lernejoj kaj kunordigos la laboron pri la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA kaj preparos prespretan dosieron surbaze de la jam ekzistantaj dokumentoj kaj novaj informoj kaj spertoj. Temas pri la lingvokono je la elementa, meza kaj – poste – supera niveloj.

IRENA SZANSER
respondecas pri la definitiva preparo de la dosiero "Instru-rajtigaj kursoj kaj ekzamenoj".

TILL DAHLENBURG
fake superrigardos la enhavon de la Ekzamenaj dokumentoj kaj prizorgos la partoprenon de ILEI en la Internaciaj Metodologiaj Seminarioj. Li ankaŭ klopodos starigi ILEI-sekcion en GDR.

BERTIL ANDREASSON
klopodos pligrandigi la financajn rimedojn de ILEI surbaze de la koncernaj diskutoj en Kerkrade kaj novaj sugestoj de E. S.

AUDREY CHILDS-MEE
inventaros la membraron de ĉiuj sekcioj surbaze de la listoj, kiujn E. S. havigos al ŝi kaj kiujn ŝi daŭre ĝisdatigos. Ĉar la Grafika Centro sendas por kelkaj landoj IPR-on rekte al la unuopaj membroj, Audrey havigos al la Centro la necesajn informojn. Okaze de sia restado en Bjalistoko en februaro 1989, Audrey informiĝos pri tio, kion la estraro de la Fondumo Zamenhof konkrete atendas de ILEI en la tuja estonto kaj poste.

ZHANG DANCHEN
aktive sekvos la evoluon de la Fondaĵo Azio, restos en kontakto kun prof. Wei kaj Umeda kaj raportos al E. S. Li ankaŭ daŭrigos la organizadon de la Ĉina sekcio per starigo de subsekcioj kun respondecaj estroj, laŭ la ricevitaj sugestoj. Li klopodos trovi en tiuj landoj de Azio, en kiuj ne jam troviĝas ILEI-sekcio, esperantistajn instruistojn, kiuj konsentas funkcii kiel oficiala ILEI-reprezentanto, atende je la eblo starigi veran sekcion.

MALCOLM JONES
okupiĝos, kiel sekretario de la LKK, pri la 23-a ILEI-Konferenco en Britio.

EDWARD SYMOENS
daŭrigos siajn klopodojn starigi novajn sekciojn kaj nomi novajn reprezentantojn, pri la starigo de aŭtonoma Eldona Fako de ILEI, pri la partopreno de ILEI en la Internacia Kongreso en Nijmegen, pri la starigo de Terminologia Komisiono, pri la informkampanjo en la Eŭropa Komunumo.

ISTVÁN ERTL
respondecas, interkonsulte kun la vicprezidanto MACGILL, pri IPR. Li klopodos fari la neceson por ke la 4 numeroj aperu en 1989. La kompostado kaj enpaĝigo fariĝas en Budapeŝto kaj la prespretaj paĝoj estas senditaj registrite kaj eksprese al PAUL PEERAERTS, direktoro de la Grafika Centro en Antverpeno, por presado kaj ekspedo. Pro la decido aperigi numeron 4/1988, n-roj 1 kaj 2/1989 verŝajne malfruiĝos, sed Ertl faros sian eblon por reguligi la situacion.

Kalmthout, 11-11-1988.

Edward Symoens
Prezidanto de ILEI

Ni kaj la strategio

Stefan MacGILL

Universala Esperanto-Asocio tradicie, almenaŭ de post 1955, funkcias pere de Bazaj Laborplanoj, da kiuj ĝi konsumis ĝis nun kvar. Por la sekva periodo ĝi naskis iom alispecan dokumenton, kiun ĝi prezentis al ĝia Komitato en Roterdamo kaj al ĝia membraro pere de la oktobra numero de la revuo *Esperanto*. La dokumento nomiĝas 'Strategia Plano' kaj ne havas fiksitan validec-periodon; ĝi aliras la planadon laŭ iom alia koncepto.

ILEI celas nun labori pli proksime kun UEA sur la eduka kampo, sekve gravas analizi tiun planon kaj konstati la priedukajn menciojn, kaj demandi nin kiel niaj planoj kaj projektoj povas iĝi parto de la 'Strategio'. Unue, mi provos resumi la Planon, due eltiri la edukaĵojn kaj laste mi donos personan pritakson de la plano – cele al debato inter niaj membroj pri ĝi kaj pri nia propra planado.

RESUMO DE LA PLANO

La Plano havas dek ĉapitrojn. La unua estas enkonduka, kiu skizas la historion kaj trajtojn de la antaŭaj planoj kaj la prepar-paŝojn por la nuna. Ĝi klopodas karakterizi sin mem jene: "evoluanta dokumento, kiun la Asocio devas konstante kontroli, elprovi kaj modifi ... do, ĝi restas matrico, aŭ kerno, de la planada procedo. Verŝajne ja necesos plidetaligi aspektojn de tiu ĉi strategia dokumento en formo de specifaj sub-planoj." Ĝi tion diras kadre de dilemado ĉu krei ĉion-ampleksan planon kiel la antaŭaj, aŭ pli rigoran, kiu klare donas prioritaton al kelkaj kampoj kaj ĉesigas agadon pri ĉio cetera. Esperante je la trovo de meza vojo, la ĉapitro vokas por decentrigo de laborfortoj direktitaj per konsento pri centraj principoj.

La dua ĉapitro prezentas la kvar celojn de UEA el la Statuto kaj prikomentas ilin. La tria librotenas la rimedojn je dispono – financajn, organizajn, homajn, organajn kaj agadajn.

La kvara kaj kvina estas la plej esencaj, nur ili kaj la unua prezentas multon novan. La kvara ĉapitro prezentas superrigardon de la strategia situacio de UEA kaj la Esperanto-movado en la nuna mondo. Ĝi estas la rezulto de diskutoj en kelkaj rondoj dum la pasinta jaro, kie oni starigis la jenajn demandojn:

1. Listigu la ses plej elstarajn fortojn de UEA nuntempe.
2. Listigu la ses plej malfortajn flankojn de UEA nuntempe.
3. Listigu la ses plej favorajn evoluojn por la Internacia Lingvo.

4. Listigu la ses ĉefajn minacojn kontraŭ la disvastigado de la IL.

La plano prezentas la interkonsentitajn ses punktojn al ĉiu demando, per tio donante, kune kun la unuaj tri preparaj ĉapitroj, la necesan bazon por pluiri al la kerna kvina ĉapitro, en kiu la plano difinas klarajn prioritatojn. Ĝi tion faras surprize rigore, per tri ĉefaj prioritatoj, kiuj ententas dek subpunktojn:

A. Disvastigo de Esperanto

1. Informado pri Esperanto al ĉiuj eksteraj instancoj
2. Instruado de Esperanto

B. Utiligo de Esperanto

3. Praktika aplikado de E en ĉiuj sferoj de la homa vivo
4. Riĉigo de la kulturo kaj lingvo de E kaj konservado de lingva unueco
5. Klerigo de la membraro pri Esperanto
6. Fortigo de la E-movado laŭnombre kaj kvalite
7. Fortigo de UEA

C. Edukado al tutmonda konscio

8. Informado pri la celoj de internaciaj organizaĵoj, precipe UN kaj Unesko
9. Informado kaj studado pri mondaj demandoj, en kulturo, scienco, ekologio, homaj rajtoj kaj aliaj
10. Kontribuo de nia scio pri lingvaj demandoj al la ekstera socio, kaj studado de la teoria kaj praktika bazo de E kiel solvo de la monda lingva problemo.

Tuj poste sekvas la atentigo "El tiuj tri ĉefaj prioritatoj, la unua – informado kaj instruado – estas la ĉefa. Ĉiuj agadoj de UEA devas esti juĝataj laŭ ilia kontribuo al plenumo de la listigitaj prioritatoj."



La restantaj kvin ĉapitroj estas malpli interesaj; ne ligitaj al tiuj nove starigitaj prioritatoj de la 5a ĉapitro, sed al la kategorioj el la 3a ĉapitro pri rimedoj.

La sesa, do, temas pri financoj kaj listigas manierojn grandigi la materian bazon de la Asocio. La sepa detaligas la rilatojn inter UEA kaj diversaj movadaj organizaĵoj, i.a. ILEI. La oka titoliĝas 'Homaj rimedoj' kaj havas subdividojn 'Stabanoj',

'Estraranoj', 'Komitatanoj', 'Gvidantoj de unuopaj agadoj, Landaj kaj Fakaj Asocioj', 'Delegitoj', 'Individuaj membroj', 'Aligitaj membroj', 'Aliaj esperantistoj' kaj 'Simpatiantoj'. La naŭa ĉapitro titoliĝas 'Organoj kaj agadoj', inter kiuj ĉefrolas prikongresaj konstatoj.

La konkluda ĉapitro insistas pri la grandigo de la rimedoj ĉiuspecaj kaj cele al tio listigas la jenajn paŝojn:

a) intensa laboro por varbi donacojn, novajn membrojn ktp.
b) pli bona vendado de niaj servoj
c) pligrandigo de niaj homaj rimedoj
ĉ) pliperfektigo de la ekzistantaj homaj rimedoj
d) pli racia utiligo de niaj homfortoj
e) preteco trovi por ĉiu laborpreta homo niĉon en la strukturo

LA EDUKA KOMPONENTO

Ĉiuj el la kvar ĉefaj statutaj celoj de UEA listigitaj en la dua ĉapitro havas edukan komponenton. Unue, la disvastigo de la lingvo evidente postulas ĝian efikan instruadon. Due, nia agado por solvi la lingvan problemon kaj faciligi internacian komunikadon tuŝas nin, unuflanke ĉar nia solvo estas lingvo, kiun necesas instrui, kaj aliflanke ĉar nia instruado devas inkluzivi konsciigon pri la ekzisto de lingvaj problemoj kaj pri la nunaj klopodoj superi, mildigi aŭ eviti ilin. La tria kaj kvara celoj postulas plifaciligon de spiritaj kaj materiaj rilatoj inter homoj sendiskriminacie, kaj disvolvon de kompreno kaj estimo por aliaj popoloj. Tion rekte reeĥas niaj streboj pri edukado por la paco, por toleremo kaj respekto al kulturaj diferencoj. Resume, eĉ unu ĉefa celo de UEA ne malhavas esencan edukan enhavon.

Punkto 352 listigas naŭ ĉefajn agadojn (kontraste al rutinaj taskoj) de la centra UEA. Edukado ne figuras inter ili, ĉar: 'Kelkaj iom gravaj funkcioj ne aperas en la ĉi-supra listo. [...] Mankas ankaŭ informado kaj instruado – denove ĉar ni ankoraŭ ne sukcesis difini adekvate la rolon de UEA en tiuj agadoj (precipe la unua). [...] Do, ni konstatas la nunan situacion, ne la idealon.'

Same en la kvara ĉapitro, ni konstatas la farendaĵojn ĉefe per negativa deduktado. Ni figuras tie kiel unu el la ses ĉefaj malfortoj de la movado: 'Manko de lerniloj kaj instruiloj: kompare kun la etnaj lingvoj, la lerniloj por Esperanto estas ofte tre primitivaj aŭ malmodernaj.' Saman distingon ni atingas inter la ses ĉefaj minacoj, sed ĉi-foje temas pri posta stadio de la eduka gamo: 'Nesufiĉa scio pri Esperanto: multaj esperantistoj restas komencantoj, aŭ nesufiĉe laboras por plibonigi sian lingvoscion. Sen granda nukleo de fluaj uzantoj, Esperanto ne povas daŭrigi sian ekziston.' Tiujn mankojn kompensas nur parte du pozitivaj aludoj. Unu el la ses fortoj estas: 'la ekzisto de multaj instruistoj inter la membraro de UEA'. Unu el la ses ekspluateblaj okazoj estas: 'la perspektivoj de moderna komunika tekniko', kiu povus inkluzivi: 'evoluigo de novaj instrumetodoj'.

La centran rolon de instruado en la prioritatoj de la kvina ĉapitro ni jam skizis, necesas iri pluen por trovi praktikan konkretigon de tio. La ŝlosila punkto tiurilate estas 732, kiu tekstas:

UEA fortigos siajn rilatojn kun ILEI, kiu restos ĝia ĉefa konsilanto kaj plenumanto sur la tereno de instruado de Esperanto. La du organizaĵoj ellaboros komunan agadplanon kaj UEA buĝetos specifan sumon por akceli la evoluon de bonaj lerniloj por Esperanto.

Ni povas aldone trovi edukajn aludojn dise tra deko da pliaj punktoj. Punktoj 65 kaj 921 ripetas saman informon: 'La Universalaj Kongresoj restos grandaj ĝeneralaj aranĝoj. La Asocio klopodos varbi kiel kongresanojn ankaŭ lernantojn de Esperanto, familianojn, kaj aliajn grupojn nun ofte neglektatajn, kaj pretigos specialajn programerojn por ili.' Multaj el tiuj programeroj havos signifan instruan enhavon, en kiun ILEI-anoj povos plektiĝi.

Punkto 723 traktas kunlaboron kun Landaj Asocioj, kaj: 'evoluigon de lerniloj kaj instruiloj' kadre de tio; punkto 916 afirmas, ke lerniloj okupas prioritatan lokon en la eldona agado de UEA mem; punkto 952 la intencon liveri lernilojn al Afriko.

Punkto 841 temas pri UEA kaj gvidantoj: 'UEA pli aktive laboros por ligi la estraranojn de [...] fakaj asocioj [...] por krei efikan komunik-reton de ĉiuj ĉefaj kunlaborantoj. Ĝi kunvokos grupojn de tiuj homoj por komunaj konsultiĝoj de tempo al tempo, aranĝos seminariojn por perfektigi iliajn kapablojn kaj sciojn, kaj sendos al ili cirkulerojn kaj informilojn.' ILEI estas komprenebla faka asocio de UEA, do tio povas koncerni nin. Punkto 924 larĝigas ĉi tiun eblon: 'UEA organizos [...] konferencojn kaj seminariojn ktp., precipe je regiona nivelo, eventuale en kunlaboro kun LA kaj FA. Ĝi aparte atentos la neceson [...] plialtigi la lingvan nivelon kaj pretigi instruantojn de Esperanto.'

Triloke ILEI estas specife menciita. En punkto 882: 'UEA dediĉos apartan atenton al la bezonoj de esperantistaj infanoj, kaj al la infanoj de esperantistoj, per aperigo de gepatraj konsilaroj kaj taŭgaj eldonaĵoj, aranĝado de specialaj dumkongresaj programeroj, ktp. Ĝi interkonsiliĝos kun ILEI kaj TEJO pri tiu ĉi temo.' Punkto 943 rilatas al eksteraj rilatoj, ĉefe kun internaciaj ne-registaraj organizaĵoj: 'UEA celos pli sisteme kaj kun pli limigita fokuso direkti siajn energiojn sur tiu ĉi tereno, kaj kunlaboros proksime kun TEJO kaj ILEI'. Punkto 961 plektas ILEI en la planadon pri Centro Zamenhof en Bjalistoko.

La konkluda ĉapitro ne specife aludas edukadon, sed la ses listigitaj paŝoj gravas same por ILEI kiom por UEA.

Jen do la plano el nia vidpunkto. Ni devas nun decidi kiel nia propra ILEI-agado povas kontribui al UEA-celoj, kiujn novajn komunajn agadojn ni povas starigi, kaj kiujn UEA-rimedojn ni povas ekuzi por nia laboro. La Plano starigas defiojn; post du/tri jaroj ni povas mezuri nian progreson laŭ ĝiaj esperoj, por tiel testi la kvaliton de nia laboro kaj prijuĝi la amplekson kaj valoron de la kunlaboro inter ILEI kaj UEA.

PERSONA PRIJUĜO

Sekvas teksto nur iomete koncizigita de persona prijuĝo de la plano sendita en februaro al UEA. Ĝi estos ricevinta multajn similajn prijuĝojn kaj surbaze de tiuj reviziita formo de la plano venos antaŭ la komitaton (kaj ILEI) en julio/aŭgusto.

"Ĉi tiu plano havas similan strukturon al klasika ŝekspira tragedio. Komence la fundamento estas bone establita, ĉio bonaŭgure kaj paŝpostpaŝe evoluas ĝis atingo de mezvoja pivota sceno. Ekde tie ĉio malboniĝas kontraŭ la atendoj kaj imagoj de la centra figuro, kies finan pereon kaŭzas nur etaj sed fatalaj difektetoj ene de si mem.

Ĉapitroj unu kaj du bone difinas la celojn de la plano kaj de UEA. Ĉapitro tri taŭge resumas la rimed-fontojn, kvankam parto de ĝi impresas kiel reludo de la Financa Kampanjo, sen motivigo, kial la ideoj devos funkcii pli bone nun ol tiam. Aparte valora estas la kvara ĉapitro, skizante nian strategian situacion pozitive kaj negative. Tiu ĉapitro, kiel kulmino de la antaŭaj tri premisaj, donas bonegan lanĉon en la veran planadon. 'Nun ni atingas la viandon en la sandviĉo' rajte pensas leganto.

La kvina ĉapitro estas nepre la vianda krusto, eĉ bonege pretigita. Kuraĝa kaj klara dismeto de prioritatoj – surprize kaj laŭdinde malmultaj – multe pli rigore elektitaj ol tiuj siatempe en Bad Saarow, kie fakte oni deklaris pli ol la duonon de ĉio 'prioritata'. La elstarigo de 'informado kaj instruado' kiel la ĉefa prioritato estas laŭdinda. La frazo tie 'Ĉiuj agadoj de UEA devas esti juĝataj laŭ ilia kontribuo al la plenumo de la supre listigitaj prioritatoj' levas la esperon, ke la sekvaj ĉapitroj komencos detaligi aŭ almenaŭ skizi planojn por realigi la plej urĝajn bezonojn sur tiuj prioritataj kampoj kaj decidos kiel mobilizi la necesajn rimedojn. La kvina ĉapitro estas la pivota.

Bedaŭrinde, ekde la sesa ĉapitro la plano seniluziigas, kaj apenaŭ plu meritas la nomon 'Plano'. Fakte temas sume pri 'Strategia Superrigardo'. Anstataŭ pluiri, ĝi reiras – al pli detala ekzamenado de la situacio. Ĝi rekuras al la pli sekura grundo de ĝeneraligoj kaj pritaksado. Ĝi falas precize en tiun saman puton, kiel antaŭaj planoj, pri kio eĉ avertas la enkonduko al la nuna plano: "Laborplano, kiu simple listigas ĉiujn jam faratajn agadojn kaj proponas pliintensigon, ne helpas orientiĝi." Tion precize faras ĉapitroj ses ĝis naŭ. Ili impresas kiel reeĥo de Estrara tagordo aŭ la Jarraporto kun la specifaĵoj eltiritaj. Ili simple katalogas (preskaŭ ĝiselĉerpe) la fakojn kaj agadojn, kaj atentigas, ke ni devas fari tion, kion ni klopodas fari kun varia sukceso de jaroj: Pri sekcio 86 ekzemple: Ni klopodas de deko da jaroj pliinternaciigi la delegitan reton, aliri pli da junaj IM, revizii la efikon de membro-kategorioj, bonvenigi novajn membrojn, aktivigi la membraron, revarbi nepagintojn, pli bone atenti SZ, ktp. ktp. Nenio vere klarigas kial aŭ kiel ni pli bone sukcesos nun. Kaj plej grave, nenio el tio servas rekte (apenaŭ eĉ nerekte) al la plenumo de la prioritatoj establitaj en ĉapitro 5, kiuj preskaŭ forgesiĝas. Do, mia respondo al la marĝena demando ĉe la konkludo 'Ĉu la plano respondas al la prioritatoj' estas klare negativa.

Tamen, ĝojinde, ke ekzistas ne-plano. Ĝi donas bonan kaj zorge trapensitan bazon por la kreo de specifaj sub-planoj. Mi akceptas la danĝeron esprimitan en la enkonduko, ke la dokumento povus esti tro specifa, kaj sekve ne sufiĉe vaste akceptebla. Tamen laŭ mi la provo trovi kompromison nepre eraris je la flanko de troa ĝeneraligo. Kompreneble, la veraj detaloj, kiel altigi, ekzemple, la kvanton, kvaliton kaj oficialecon de Esperanto-instruado kuŝu en sub-planoj, eĉ en planoj de ILEI kaj ne UEA. Tamen, la *Strategia Plano* devus almenaŭ listigi en sesa ĉapitro dekon da klare plej urĝaj projektoj, kompletige al tiu punkto 51(a). La ĉefa maniero imagi konkretaĵojn el la nuna formo de la plano estas retro-dedukti ilin el la manko-listo en la kvara ĉapitro.

Difininta la plej bezonatajn projektojn, posta ĉapitro devus indiki, kiuj estas la plej verŝajnaj plenumantoj kaj kiujn rimedojn ili povas uzi tiucele. Se la centra UEA ne havas mem la necesajn laborfortojn, ĝi devus delegi tiujn specifaĵojn al Landaj aŭ Fakaj Asocioj, regionaj centroj aŭ unuopuloj. La komunik-rimedoj de la Asocio, ekzemple, devas servi multe pli klare al la plenumo de tiuj prioritataj celoj, ĉar alternativoj apenaŭ ekzistas.

Do, la vojo antaŭen estas starigi koncentritajn laborgrupojn por formuli tiujn planojn kaj sub-planojn ĉirkaŭ la prioritatoj. ILEI evidente volonte ludos aktivan rolon en tio, laŭ la senco, unuavice, de alineo 732."

* * * * * * *

LUDOJ POR KOMENCANTOJ


Jacques MANCEAU

Ludo de la naŭ familioj

Ĝi utilas por lernigi la korelativojn en elementa kurso, ĉar pro la simileco de tiuj vortetoj, la lernantoj-komencantoj iom miksas ilin. Post plurfojaj tiaj ludoj videbliĝis pliboniĝo.

La familioj estas: TEMPO, AĴO-ECO, LOKO, MANIERO, KAŬZO, POSEDO, INDIVIDUO, KVANTO, KVALITO.

La kvin membroj de ĉiu familio estas: DEMANDA-RILATA, MONTRA, NEGATIVA, KOLEKTIVA, MALPRECIZA.



La celo de la ludo estas arigi tutan familion. Oni ludas ĉu per la postulo "Bonvolu doni al mi en la familio loko, la montran karton TIE" ktp., ĉu per eltiro de unu ludanto al alia, ĉu per eltiro el restanta stako ktp.

Danke al la traduko, la komencanto enkapigas senrimarke la signifon, sed la demandoj-postuloj kaj diroj devas okazi nur en Esperanto.

Plie, kiam unu ludanto arigis tutan familion, por ke la poento valoru, li unue devas eldiri simplan frazon, en kiu li laŭelekte uzu unu el la vortetoj de la arigita familio.

Ĉi-apude ni montras specimenon de tia karto kun traduko nacilingven. Ni opinias, ke ludoj pri karto-familioj estas vaste konataj, tial ni ne multon diras pri la ludo mem. Tamen, ni atentigas, ke grava estas la relativa grandeco de la diversaj indikoj.

Alfabeta vortludo

Por tiu ludo oni bezonas neniun materialon. La kunludantoj sidiĝu en rondo, kaj oni lotas la unuan por ludi. Tiu diras vorton komenciĝantan per A; la

dua ankaŭ, same la tria kaj la kvara ktp., ĝis ludanto, kiu ne plu trovos vorton: li metos unu poenton al sia konto kaj nomos vorton komenciĝantan per B, kaj la ludo daŭras tiel.

Fine, oni sumigas la poentojn de ĉiu, gajnanto estas tiu, kies sumo estas la plej malgranda.

Lertkapulo

La ideo pri tiu ludo originas de alia ludo aperinta en la ĝenerala komerco antaŭ pluraj jaroj; tiu nomiĝas iom bombaste "Master mind" (majstra menso), kaj konsistis el diveno de pluraj koloroj pripensitaj laŭvice.

En Lertkapulo oni anstataŭas la kolorojn per literoj. Tiel, ĉar literoj nombras 28, la kombin-nombro estas multe pli granda ol kiam oni uzas kolorojn. Sed ne tiom pli multa ol unuavide aperas, ĉar la literoj elektitaj devas kunmetite formi vorton. Tiu elektita vorto devas esti senelizie kompleta, kaj por la substantivoj kaj adjektoj, kun la markoj de nominativo, akuzativo kaj pluralo aŭ ne, de direkto aŭ ne por la adverboj, de ĉiu ajn tempo- aŭ modo-finaĵo por la verboj, kaj kompreneble sen finaĵo por vortoj memkompletaj, kiel "kvar, kvin, tiam, ĉiom, kiel ... apud, post, krom...".

Ni rekomendas limigi sin al vortoj kvar-literaj, por ke la ludoj ne estu tro komplikaj kaj longaj.


La ludo estas ludebla inter proponanto "A" kaj alia aŭ tuta rondo, kies partoprenantoj ludas laŭvice. Oni bezonas tabulon sur kiun la proponanto skribos laŭvice la vortojn provitajn de la rond-ludantoj, kun apude la nombro de literoj, kiuj kongruas ĝustaloke kun la lia. Tiun vorton, elektitan de la proponanto, li antaŭe sekrete skribis sur kaŝitan paperon. La rond-ludantoj rajtas ĝis dek provoj; poste ili perdos la ludon. Se la vorto estas trovita antaŭ aŭ ĝis dek provoj, la lasta diranto prenas la lokon de la proponanto.

Ekzemplo (simpla) La proponanto kaŝe skribis la vorton TURO

B provas AKVO - A skribas 1 apud akvo (la fina litero de akvo)
C provas KOLO - A skribas 1 apud kolo (ĉiam nur la fina litero)
Ĉ konkludas, ke la fina litero estas ĝusta, ĉar ĉiuj aliaj ŝanĝiĝis.
Ĉ provas do TASO - A skribas 2 apud taso (literoj T kaj O)
D provas MASO - A skribas 1 apud maso (litero O)
E konkludas, ke nur T povas esti ĝusta litero (nek A, nek S)
E proponas TERO - A skribas 2 apud tiu vorto
F konkludas, ke la literoj E kaj M estas neĝustaj.
F provas TUBO - A skribas 3 apud tiu vorto

G konkludas, ke unu el la literoj U aŭ B estas ĝusta.
G provas TULO - A skribas 3 apud tiu vorto
Ĝ konkludas, ke la litero U estas ĝusta, kaj preskaŭ kun certeco proponas
Ĝ provas TURO - A perdis la ludon kaj Ĝ prenas lian lokon.

La pendigota kriminto



Tiun ludon vi eble ludis infanaĝe. Ni tre malmulte ŝanĝis ĝin. Okazis krimo. Pro ĝi oni akuzas ludanton, kiu estos pendigota, se li ne divenos la personan nomon de la vera krimin-to. La detektivo donas al li la unuan literon kaj la lastan de la nomo kun la liternombro. Ekzemple: A _ _ _ _ _ _ _ o por Aŭgusteno. La ludanto devas provi literon post litero; ki-am li fiaskis, oni konstruas por li pendumilon ĉiufoje per unu streko; li perdas, kiam la pendumilo estas finkonstruita antaŭ ol li trovis la nomon.

Oni povas faciligi la ludon metante samtempe ĉiujn samajn literojn aŭ tre malfaciligi ĝin, postulante samtempe la ĝustan lokon de la litero. Apude, oni vidas por la simpla ludo 5-strekan pendumilon kaj 12-strekan por la malsimp-la. La nomojn oni elektu el fidinda vortaro. Oni povas varii demandante la lan-don de la kriminto anstataŭ la persona nomo.

N.B. La sola internacia traduko por "Prénom" ne estas "antaŭnomo" nek "baptonomo", sed "persona nomo". Preskaŭ ĉiuj azianoj kaj kelkaj Eŭropanoj metas siajn "personajn nomojn" poste, kaj ne estas baptitaj.

Oni nombras

Oni rondire nombras, sed ĉiun nombron entenantan la ciferon sep aŭ kiu estas oblo de sep, oni anstataŭas per DING! Ekzemple: unu, du, ... kvin, ses, ding! ok, naŭ ... dek-du, dek-tri, ding! dek-kvin, dek-ses, ding! dek-ok, dek-naŭ, dudek, ding! dudek-du ... Kiu eraras, eliras el la rondo ĝis restas nur unu: la venkinto. Tiun ludon oni povas fari kun komencantoj, sed ĝi estas malpli fa-cila ol unuavide... (atendu ĝis vi atingos sepdek!)

Daŭrigota.

Internacia Metodika Seminario Poprád, Slovakio

KONKLUDOJ KAJ REKOMENDOJ DE LA 7-A INTERNACIA METODIKA SEMINARIO (IMS), POPRAD (ĈS), 1989-04-26/30

La temaro de IMS-oj pli kaj pli vastiĝas, tiel ili fariĝas prefere lingvo-pedagogiaj seminarioj ol strikte nur instrumetodikaj. La 7a IMS okazis en la Kleriga Centro de Slovakia E-o-Asocio. 42 personoj partoprenis ĝin el 5 lan-doj: Bulgario (3), Ĉeĥoslovakio (18), Hungario (19), Pollando (1) kaj Vjetna-mo (1). ILEI-n reprezentis ĝia vicprezidanto, Stefan MACGILL. Komisie de D-ro Till DAHLENBURG, estrarano de ILEI pri pedagogiaj aferoj, la semi-narion fake gvidis BARCSAY Zsuzsa.

La kadrotemo de la 7-a IMS estis:

– kapabligo de instruistoj kaj de lernantoj je lingvaj komparoj (konsciigo pri interferoj k. s.);

– apliko de lingvaj scioj (transiro de receptivaj kapabloj al produktivaj) cele al

– morala edukado kaj plivastigo de ĝenerala klereco.

La faka programo disvolviĝis en formo de 17 prelegoj, 2 praktikaj prezen-toj, krome ampleksaj, viglaj alparoloj kaj diskutoj. La kontribuaĵoj grupiĝis laŭ iliaj temoj jene:

Lingvaj komparoj, lingvaj interferoj

– SZANSER (šanser), Irena (PL): Psikolingvistikaj kialoj de lingvaj inter-feroj. Kiel trakti kaj preventi erarojn

– KOUTNY (kutni) Ilona (H): Lingva interfero kaj la vortaro

– JUHÁSZ (juhas) Magdolna (H): Kiel instrui uzadon de dulingva vort-aro por konsciigi gelernantojn pri interferoj

– BALLA Károly (H): Esploro de la E-a leksiko. E-o kiel propedeŭtiko al aliaj fremdaj lingvoj

Evoluigo de lingvaj kapabloj

– SZANSER, Irena (PL): Psikolingvistikaj bazoj de receptivaj kaj produk-tivaj kapabloj

– BALOGH (balog) Viktória (H): Kiel helpas la E-o-instruadon la mate-matika pensmaniero

– BARCSAY (barĉai) Zsuzsa (H): Tekstoprilaborado en la servo por elformi produktivajn kapablojn (praktika prezento)

Teorio de instruado

– ŜATURA (ŝatura), František Dr. (ĈS): Didaktiko estas scienco

Lerneja lingvopolitiko

– BARANDOVSKÁ, Vera Dr. (ĈS): Ĉu Esperanto instruendas? Kiuj lingvoj estas bezonataj?

– KOVÁCS (kovaĉ) Márta (H): Kiujn lingvojn instrui; Reformpropono en Hungario

Instruhelpiloj kaj lerniloj

– ŜATUROVÁ (ŝaturova), Magda Dr. (ĈS): Lernolibroj de fremdaj lingvoj

– MACGILL (mekgil), Stefan (NZ/H): Survoje al internacia lernolibro

– BARTHA (barta) Emma (H): Komputilaj programoj en E-o-instruado (praktika prezento)

– KERESZTHEGYI (keresthedji) Tivadar (H): Kiel mi aplikas en la instruado de E-o la skribsistemon "Vidling" por aktivigi la latentan lingvoscion

Psikologiaj, edukaj, klerigaj aspektoj

– HRADIL (hradjil), Jozef Dr. (ĈS): La instruisto kaj la nekonata lernanto (psika analizo de korespondaj kursoj)

– BACEV, Marin I. (BG): Internacia korespondado kiel motivo por lerni E-on

– POSPIŜIL, Vaclav (ĈS): E-o en eklezioj; E-o inter infanoj

– UZUNOV, Nikola (BG): Rolo de lingvaj ludoj en E-o-instruado

– BARCSAY Zsuzsa (H): E-o-instruado cele al morala edukado

Pli detala, analiza ekspliko de la programo aperos en IPR.

Porokaza komisiono – kiu konsistis el MacGill (ILEI); Dr. Nemec, Dr-ino Ŝaturová, Zachariás, Zvara (ĈS); Bacev, Bujuklieva (BG); Barcsay, Kovács (H); Szanser (PL) – post pridiskuto kompilis *jenajn konstatojn* kaj rekomendojn:

1. La prepariteco de la seminario estis kontentiga, same tiel la disponigo de tre taŭga seminariejo kaj ĉiuj bezonataj instrumentoj, dokumentoj k. s. Dankon pro tio al SEA kaj al la Slovakia ILEI-sekciestro, Anton ZACHARIÁS. Tamen, la invito al unuopaj personoj iom malfrue alvenis, pro tio kelkaj devis rezigni pri partopreno.



2. Bedaŭrinde neniu ŝtata, politika, urba, faka institucio reprezentis sin en la seminario, nek publika komunikilo (gazetaro, radio, televido) diskonigis la internacian fakan eventon malgraŭ tio, ke la rekomendoj de la 6-a IMS alvokas je tio, krome dum la prepara traktado reprezentanto de ILEI aparte atentigis la organizantojn pri tio.

3. La plejparto de la kontribuaĵoj ligiĝis al la kadrotemoj kaj disvolvis ilin. Praktikaj prezentoj, kiuj aktivigis la partoprenantojn, okazis nur du (Barcsay, Bartha).

4. Sufiĉe da diskuttempo estis je dispono, kaj tion la seminarianoj tre bone utiligis.

5. Sekretario de SEA, inĝ. Milan ZVARA promesis eldoni la materialon de la 7-a IMS, pro tio la seminarianoj esprimis sian ĝojon.

Rekomendoj por la 8-a kaj venontaj IMS-oj

1. La kadrotemo estu pli detale disvolvita kaj tiel prezentita al la prelegontoj, kiuj mem notu, al kiu subgrupo de la kadrotemo apartenas lia/ŝia prelego.

2. Pri la prelegproponoj decidu komisiono faka.

3. Organizantoj instigu partoprenontojn por prezenti modellecionojn.

4. La seminarianoj laŭeble povu spekti studhoron de loka kurso (en Slovakio bedaŭrinde la programo preteratentis kurson en najbara ĉambro!)

5. La formo de IMS-oj estu pli varia: ĝi inkluzivu spert-interŝanĝojn, forumojn, tablodiskutojn ekz-e por kompari postulojn ktp. de diverslandaj instrup-

rogramoj kaj rezultoj. Reprezentantoj de unuopaj LA-oj preparu kaj prezentu la necesan materialon.

6. IMS-oj estus aranĝataj en periodo, kiam en la gastiganta lando/regiono estas lernejaj ferioj, por ke pli da surlokaj instruistoj povu partopreni ilin.

7. La 8-a IMS okazu en iu Sovetia respubliko, laŭeble en Litovio aŭ Estonio. La organizanto de la 7-a IMS estas komisiita kontakti la menciitajn Asociojn por esplori la eblecojn kaj peti respondon de ili ĝis 30 septembro 1989.

8. Proponataj temoj por la 8-a IMS:

A) Teoria temo:

ĝeneralaj psikologiaj faktoroj en la fremdlingvo-instruado: rolo de konigaj, afekciaj, volaj procezoj (temo el lingvopedagogia kurso de ILEI)

B) Praktika temo:

enlingvaj interferoj en E-o: ilia instruado praktike (modellecionoj bazitaj sur kaj enkondukotaj per lingvistikaj kaj metodikaj principoj)

AB) Kaj teoria kaj praktika temo:

la rolo de lernolibro kiel ĉefa instruhelpilo en la instruprocezo; kompletigaj instruhelpiloj (prezento kaj analizo de ekzistantaj aŭ pretigataj instruhelpiloj)

Poprad, 1989-04-30

Stefan MACGILL, Anton ZACHARIÁS, BARCSAY Zsuzsa

Internaciaj kursoj en Karlskoga, Svedio

"La 8-semajnaj E-o-kursoj ĉe nia popola altlernejo sukcese daŭras. Nun ni havas la 5an longan kurson sinsekve kun gelernantoj diversaĝaj. Oni studas ĉ. 25 horojn semajne E-on kaj en ĉiu grupo ordinare estas 10 – 12 partoprenantoj.

La 13an de marto komenciĝos kurso por progresantoj kaj aŭtune estos kursoj por komencantoj (de 21a de aŭgusto ĝis la 23a de oktobro) kaj por progresantoj (de la 16a de oktobro ĝis 8a de decembro). Ni vere bonvenigas eksterlandanojn. Krom E-o oni povas elekti aliajn temojn de studo, ekz. ceramikon, muzikon, bazan komputadon ktp. Modernaj studĉambroj, lingvolaboratorio, agrablaj loĝejoj, belaj ĉirkaŭaĵoj. Kostoj, ekskl. vespera kaj semajnfina manĝado: 3700 svedaj kronoj.(...)

La lernejo krome proponas en julio (3-7) unu-semajnan kurson je tri niveloj, por kiu la kosto por studado, loĝigo kaj manĝoj estas SEK 1100.

Pliaj informoj: Karlskoga folkhögskola, S-691 24 Karlskoga, Svedio, Tel. 0586 - 503 60. Lars Forman, kursgvidanto"

NIA LETERKESTO

Mi specife deziras skribi pri la artikolo de E. Csiszár, "Antinomio de la lerneja lingvaĵo al la aplikebla". Sendube pesimista registro de la vero estas malbongusta al ĉies lango, sed mi miras pri la redaktora noto sur p. 17. Kiel povus iu ajn dubi pri la fakto, ke Csiszár diris la puran veron en sia artikolo? Ĉu post 100 jaroj da vana klopodado edukadi la mondon per enkonduko de E-o en la lernejojn ni ankoraŭ ne povas agnoski, ke nia strebado fiaskis kaj plu fiaskos se ni daŭrigos nian stultan kutimon kaŝi la kapon en la sablo?

Csiszár ne skribis pri nur hungara problemo, li skribis pri tutmonda problemo. Se oni rigardas la statistikojn eldonatajn jaron post jaro, ekde la fino de la dua mondmilito multaj centmiloj da infanoj registriĝis en lernejaj klasoj de E-o. Kial do la aktiva e-istaro en 1989 ne estas pli granda ol en 1950? Kien forvaporis tiuj fantomecaj lernintoj? Nu, tiom fantomaj ili ne estas. Mi renkontis tre multajn personojn en Usono kaj en Aŭstralio, kiuj komentis al mi ke ili studis E-on en la lernejo...kaj nuntempe nenion memoras pri ĝi. E-o estis altrudita studobjekto. Kaj oni forgesis ĝin tiel rapide kiel la latinajn kaj trigonometriajn klasojn, post la lernejo. Dum pluraj jardekoj post la dua Mondmilito E-o estis oficiala subjekto en la Kvakera Lernejo en Hobarto, Tasmanio (Aŭstralia ŝtato), akceptata de la edukdepartemento registara kiel subjekto rajtiganta eniron en universitaton. Nu, la Aŭstralia E-o-Asocio havas naŭ membrojn en Tasmanio. La konkludo estas memevidenta.

Anstataŭ ektimi rigardi la faktojn, kial ne serioze akcepti la atentigojn de Csiszár kaj pripensi kiel fari novan strategion por akceptigi E-on en la mondo?

Donald Broadribb
Redaktoro de THE AUSTRALIAN ESPERANTIST
kaj eks-lingvoinstruisto

Mi ĵus tralegis la n-ron de okt.-dec. 1988 de IPR, kaj mi decidis komuniki al vi, ke mi multe aprecas ĝian altnivelan enhavon.

Al mi speciale plaĉis la artikolo "Priparolata tempo - relaiva tempo". E-istaj instruistoj ja amas ofte legi pri la aferoj gramatikaj de E-o.

Altestime

Carlos I. de Jesus, Taunton, Massachusets, Usono

En la artikolo "Antinomio de lerneja lingvaĵo al la aplikebla" Ernő Csiszár tute bone analizas la lingvoinstruadon en Hungariaj lernejoj. La sama situacio tute regas ankaŭ en Estonio. En niaj lernejoj estas same devigaj fremdlingvoj rusa, angla aŭ germana (ekde la nova lernojaro ankaŭ E-o). La rusan niaj gelernantoj eklernas ekde dua klaso. Dum dek jaroj ili lernas en lernejo la lingvon, sed

post la fino de mezlernejo ili malmulte kapablas ĝin uzi, kvankam la rusan ni povas praktiki preskaŭ ĉiutage. Kontraŭ rusa lingvo niaj homoj estas malestimaj pro politikaj kaŭzoj kaj pro tio ankaŭ multaj ĝin ne ŝatas lerni. La anglan aŭ germanan oni lernas dum 8 jaroj kaj la situacio estas preskaŭ sama, ke plimulto la lingvon ne konas eĉ elemente. Por tiuj lingvoj niaj gelernantoj ne havas stimulojn, ĉar post lernejo ili neniel povas uzi ilin. La sama situacio regas ankaŭ rilate al E-o. Nura ebleco ĝin uzi estas korespondado, kaj ankaŭ tio estas tre malfacila afero. Multaj leteroj perdiĝas survoje, al multaj oni ne respondas, multaj eksterlandanoj ne deziras korespondi kun homoj el Sovetio ktp. Kion devas mi, kiel instruisto, diri al miaj gelernantoj, kiam ili demandas min: "Por kio mi eklernas ankoraŭ unu fremdan lingvon, se mi ĝin ne povos uzi libere dum mia vivo?" La demando estas aktuala, sed kion respondi?

Rein Saag, Viljandi, Estonio, Sovetio

Plaĉegis la artikolo de Ernő Csiszár en la lasta numero. Ĉiam tio plaĉas, kiam oni preskaŭ same opinias! Sed espereble venos kontraŭargumentoj por estigi *pensigan* diskuton.

Edmond Ludwig, Munster, Francio


(...)Pri via respondo al J. Dony rilate al mia broŝuro (IPR, okt.-dec. 1988, p. 23): fakte "La oficiala situacio de la E-instruado en la mondo" havebla en la serio "E-dokumentoj" de UEA NE estas ĝisdatigita; temas pri la 2a eld. (1980) kaj la 5a (1984) de mia broŝuro, kies 7a eldono aperis en junio 1988. En la serio de UEA la dokumento certe plibele aspektas, sed ĝi estis eldonita kun 1-jara malfruo, kiam pluraj informoj jam kadukiĝis! Sekve mia libreto en la "E-dokumentoj" de UEA ne estas rekomendinda al homoj, kiuj deziras havi plej bonan skizon de la nuna situacio.(...)

Germain Pirlot, Oostende, Belgio

La unuan fojon nialande, KEA ricevis la viziton de rektmetodaj instruistoj, kiuj afable kaj sindone venis al Kubo por magistre pruvi ĉion, kion apartaj kompetentuloj povas fari dum instruado: Marin Bacev kaj Eva Bojagieva. (...) Hodiaŭ, kiam pasis tuta jaro de la foriro el Kubo de Marin kaj Eva, ni ankoraŭ pridiskutas iliajn teknikojn kaj ĉion memoras, kvazaŭ ili estus inter ni. Eĉ pli. La kurso kiun ili gvidis, malgraŭ ties mallonga daŭro, estis la unua en Kubo, kiu komenciĝis per certa kvanto de enskribiĝintoj kaj finiĝis duobligante aŭ eble triobligante tiun unuan kvanton. Nia instruistaro ankaŭ ĉeestis la kurson kaj ni povas fiere aserti, ke oni montris al ni la ĝustan modelon pri pedagogia E-agado.(...) Dankojn, karaj geamikoj, unu fojon plu! Tiuj novaj Esperanto-rozoj , kies petaloj estas tiom bulgaraj kiom kubaj, piedestalas kiel ĉiamaj pruvoj de amikeco inter homoj kiuj, super naciaj baroj konstruas pli pacan, pli noblan homaron.

Juan Lázare Besada Toledo Havano, Kubo.

RECENZOJ



FREINET kaj moderna edukado (*Michel Barré*). Tradukis de la franca al E-o Simone BONIOL – antaŭparolo de Jean MARIN. Eldonis: ICEM-ESPERANTO

Ĉu temas pri biografio de Célestin Freinet? Ĉu temas pri pedagogia gvidlibro? Fakte ambaŭ temoj enestas, sed dum la legado evidentiĝas, ke ne eblas disigi unu de la alia. Montriĝas, ke Célestin Freinet apartenas al tiuj homoj, kiuj ne teoriumas, kiuj ne nur aplikas pedagogiajn rimedojn, sed vivas ilin kune kun la lernantaj infanoj – la redukta vorto "lernanto" tite tute ne povas taŭgi. Kiel por ĉiuj tutecaj homoj, lia propra vivovojo ne facilis en mondo de sistemoj kaj ismoj ĉiuspecaj. Jen la destino de ĉiuj pioniroj.

El lia vivkoncepto kristaliĝis lia pedagogio. Malkovrante liajn teknikojn, francaj pedagogoj rekonos nun en la landa lernsistemo vaste ĝeneraligitajn erojn de lia pedagogio. Sed jen la fiasko, laŭ la Freinet-anoj: ne valoras la parto sen la tuto!

Dank' al tiu E-o-traduko Freinet ree internaciiĝas, kio des pli gravas, ke internacieco estis de la komenco ĉe la bazo de liaj pensado kaj vivado. Kvankam ekde 1926 la Freinet-movado eniris e-istajn rondojn – la libreto prezentas la uzadon de E-o fare de Freinet-instruistoj – tiu verko estas bonvena kiel efika informilo.

Bedaŭrindas la malbona kvalito de la reproduktitaj fotoj, sed ĉar la celataj legantoj ĉefe estas pedagogoj, oni povas esperi, ke ilin antaŭ ĉio interesas la ideoj. Cetere: estus interese malkovri per E-o alilandajn pionirajn pedagogojn, des pli ke granda parto de la e-istaro konsistas el instruistoj.

EDMOND LUDWIG

ESPOLEZN 1 de LEZ PERANTO (L.G. Hartridge)

"Tiu aparato savos nian lingvon!" Les Hartridge, emerita angla instruisto pri teknikaj studoj, matematiko k. s. tiel parolis en Grésillon, Francio, dum la paska renkontiĝo, pri la vidbendprezentilo 'magnetoskopo'. Tiom konvinkita estas Les pri la valoro de tiu aparato por informado kaj instruado, ke li mem produktis 100-minutan Eo-kurson sur vidbendo, bazitan sur la dek-leciona

senpaga korespond-kurso, kiun li mem verkis por la brita E-o-asocio. Kopiojn de la vidbendo li donacis al publikaj bibliotekoj sialande – 12 al tiu de Brajtono, la ĉi-jara UK-urbo – por senpaga prunto. Unu li donacis al Biblioteko Hodler en la CO de UEA, kaj tie mi havis okazon serioze studi ĝin.

La anglalingva enkonduko, parolata de Les mem, havas kiel elirpunkton la teknologion. Les, kiu laboris dekkvin jarojn kiel teknikisto antaŭ ol li fariĝis instruisto, klarigas, ke en la kampo de teknologio, kiam oni volas studi ion novan, oni unue faras modelon de la studota objekto por kompreni la bazajn regulojn de ĝia funkciado, kaj ĉar E-o estas ĝuste tia modelo de lingvoj, ĝi aparte taŭgas kiel propedeŭtika studo en lernejoj. Tiun vorton, 'propedeŭtika', li tamen ne uzas. Lia aliro estas malpompa, malstreĉa, amika, konversacia. Jam per tio li allogas la scivolemulojn. Kvankam instruado de lingvo pere de alia lingvo ne estas mia preferata metodo, mi estis ravita de la matematika klareco de la enkonduko kaj la prezentado de la instrumaterialo.

Ĝis la kvina leciono mi apenaŭ havis kritikojn krom, jen kaj jen, pri makuletoj ĉe la elparolo. De leciono kvin, tamen, mi komencis malkonsenti pri kelkaj prezentadoj: ekzemple, la instruadon de ĉiuj kvin radikoj kaj ĉiuj naŭ finaĵoj de la korelativoj en la daŭro de nur kelkaj minutetoj mi trovas malkonsilinda, kaj la prezentadon de kompleksaj verbo-formoj jam en la leciono ok mi juĝas nepre nenecesa. Eblas instrui la participojn aktivajn kaj pasivajn sen tiu komplikaĵo, kiel ag-adjektivojn aŭ per pluformado kiel substantivojn. Efektive oni aŭdas Les, la prezentanton, mem konfesi, ke tiu parto de la lernado apartenas al posta kurso. Prefere ĝi estu transigita al posta kurso, ĉar mi esperas, ke Les Hartridge daŭrigos sian agadon ĉi-kampe post tiu eksperimento.

Mi entuziasmas pri ĉi tiu video-kurso por anglalingvanoj. Malgraŭ mankoj – vortfarado per afiksoj estas instruata, sed ne tiu per radikkunmeto; inter la afiksoj ne troviĝas 'ig' nek 'iĝ'; oni lernas pri la akuzativo de almovo, sed ne pri tiu de mezuro...ktp., sed ĝi celas prezenti la specialajn ecojn de E-o, la simplecon kja ekonomiecon de ĝia strukturo, ne la tutan gramatikon – jam en sia nuna stato ĝi klare montras vojon irindan. Senigita de la makuletoj kaj mankoj, ĝi estus elstara modelo por tiuspeca instruado de E-o pere de aliaj naciaj lingvoj, kaj bonega unua paŝo en serio de video-kursoj de elementa ĝis altgarda niveloj.

La vidbendo kun akompana materialo por anglalingvanoj – Dek-leciona enkonduka kurso kun solvoj de la ekzercoj; A Key to Esperanto; English-Esperanto Vocabulary; Esperanto for Beginners de Montagu Butler – estas havebla kontraŭ pago de dek pundoj sterlingaj (inkluzive de sendokostoj) de:

Lez Peranto Limited, 74, Devonshire Way, Shirley,
Croydon, England CRO 8BS, Britio.

AULDREY CHILDS-MEE

IRENA SZANSER: Glotodidaktikaj kaj specifaj aspektoj de E-o-instruado – metodika helpmaterialo por pedagogia-metodika kurso, por rajtigi E-kursgvidantojn, por plieduko de E-o-instruantoj; ILEI/UEA/KCE, La Chaux-de-Fonds, 1988.

Post la jugoslavo *Rakuŝa* (Metodiko de la Esperanto-instruado) kaj la hungara *Szerdahelyi* (Metodologio de Esperanto) nun la polino *Irena Szanser* kontribuas al la ege bezonata materialo pri didaktiko de E-o.

Dum *Rakuŝa* resumis la glotodidaktikon kaj *Szerdahelyi* ĝin profundigis por profesiaj instruistoj, *Szanser* sistemigas tiun materialon por ĉiaj kursgvidantoj, liverante precipe utilajn difinojn de la fakterminoj kaj kaptante en la enkonduko la esencon de certaj iom malfacilaj lingvistikaj kaj didaktikaj nocioj.

Kiam Germana Esperanto-Instituto aranĝis sian unuan kursestran seminarion en 1983, *Rakuŝa* estis elĉerpiĝanta, *Szerdahelyi* malfacile ricevebla kaj *Szanser* ankoraŭ ne je dispono.

Konforme al la plej modernaj ekscioj, *Szanser* emfazas i. a.

– la rean plisignifiĝon de la gramatika instruo kun diferencigo inter profunda kaj surfaca strukturoj kaj ties rolo en la realigo de la instrucelo,

– "interferojn" el la gepatra kaj el aliaj fremdaj lingvoj kaj interne de la internacia lingvo mem, kaj ties gravecon por la instruanto, kiu devas koni ilin kaj zorgi pri evito de ili,

– ĝenerale la bezonon je unueca deviga instruprogramo por la internacia lingvo, kiu servu kiel bazo por aŭtoroj de lernolibroj kaj instrumaterialo, trejnontoj de kurestroj kaj por la kurestroj mem,

– la signifon de preparado de la instruo por la sukceso de la kurso.

Finfine disponeblas nun baza verko por la trejnado de kursgvidantoj. Dankon al *Irena Szanser* kaj gratulojn al ILEI, UEA kaj KCE pro ties ekzempla kunlaboro. La verko de *Irena Szanser* nun estos deviga legaĵo por la kursestra seminario de Germana Esperanto-Instituto.

Gerald Tucker (el AGEI-Cirkulero nro 4/88, nov.)

Ni volonte publikigus pli ampleksan pritakson de tiu ĉi verko. Via kontribuo estas atendata - La red.

Eldonejo KARDO ofertas – krom daŭre haveblaj valoraj verkoj, kiel ekz. la poemaro **Merlo sur menhiro** de Albert Goodheir, **Epifanio** de Shakespeare kaj **Robajoj** de Omar Kajam (ambaŭ tradukitaj de William Auld), tradukoj el Platono, Eŝilo, Eŭripido kaj Boecio de Albert Goodheir, eseoj **La fontoj de Esperanto** kaj **La kresko de la esperanta vortprovizo dum la unuaj tri jaroj** de D. B. Gregor – kvar novajn eldonaĵojn:

– la eseon, premiitan en Belartaj Konkursoj 1986, **Esperanto en nova framo** de Albert Goodheir (frazo el la resumo: "inter la movadoj, kiuj provas evoluigi la neglektatan parton de la homa naturo – t. e. la analizan parton de la menso -la red. – , la E-o-movado,kiu simboligis kaj elvokas la intuician scion pri interhoma unueco kaj kompreno, povas ludi gravan rolon. Ĉu ĝi faros tion dependas de la e-istaro.");

– la koncize precizan **La skota lingvo hodiaŭ kaj hieraŭ** de William Auld, kiu prezentas la historion de neglektata lingvo ĉefe el literatura vidpunkto;

– fragmenton el Rudyard Kipling, **La fratoj de Maŭgli**, tradukitan de Peter Clissold

– kaj la lastan n-ron de "Esperanto en Skotlando".

La adreso de KARDO: 16 Woodlands Drive, Coatbridge ML5 1LE, Skotlando.

Laste aperis: nova faldprospekto pri Vieno en Esperanto! Bonvolu mendi ĝin (se vi loĝas ekstere de Vieno) ĉe: Wiener Fremdenverkehrsverband, Kinderspitalgasse 5, A-1095 Wien (Vieno).

KOLEGHELPA FONDAĴO

Multaj el niaj gekolegoj en la mondo ne povas esti membroj de ILEI por diversaj kaŭzoj. Ili loĝas en la t. n. tria mondo aŭ en landoj kun transpagaj problemoj ktp.

Ĉu vi volas helpi ilin? Ĉu vi volas starigi koleghelpan fondaĵon?

Se jes, sendu grandan aŭ malgrandan donacon al la kasisto de ILEI.

Vi povas pagi al la poŝtĝirkonto 68 21 17 -7,

ILEI, Södra Rörum pl 455,

S-242 94 HÖRBY Svedio

aŭ per poŝta mandato, aŭ per ĉeko

aŭ per monbileto(j)


aŭ per internaciaj respondkuponoj

al la supra adreso.

Vi ankaŭ povas peti vian landan sekcion enkasigi koleghelpajn kotizojn inter la membroj. Poste la sekcio sendos la sumon al la kasisto de ILEI.

Anticipan dankon

Bertil Andreasson, kasisto de ILEI




En la hispana urbo Granada naskiĝis antaŭ nelonge grandespera projekto nomata AMIGOS DE GAIA - AMIKOJ DE GAIA - FRIENDS OF GAIA (komuna mallongigo, konsideranta la esp-an signifon, estas AGO). Ĝia celo estas restarigi, ene de dek jaroj, la biosferon de la Tero tiel, ke ĝi estu sana, nedifektita de la homo, kaj integrigi ĝin kun homaro konscia pri sia primara tasko defendi la vivon sur nia planedo. AMIKOJ DE GAIA, kies laborlingvoj estas la hispana, E-o kaj la angla, konceptas sin kiel eron en la granda komunumo de tiuj organizoj kaj iniciatoj, kiuj strebadas por la sama celo. Unu el la agokampoj de AGO estas E-o, kiun ĝi konsideras kiel "novan demokratian kaj planitan lingvon, kiu jam havas tre internacian kulturon. Ĝi celas protekti ekzistantajn naciajn lingvojn, kaj kune kun ĥa angla ĝi povus ludi gravan rolon en ekologia kunlaboro. Por majstri ĝin necesas lernado de inter tri monatoj kaj unu jaro."

Por realigi siajn klopodojn koncerne E-on, AGO intencas starti per ambicia surloka plano en Granado: organizi kurson por ĉ. 40 instruistoj, kiuj kvalifikiĝus por pluinstruado al grandaj amasoj de studentoj. (Granada estas - proporcie - la plej studenta hispana urbo.) Tiucele AGO SERĈAS HOMON KAPABLAN KAJ PRETAN DUNGIĜI POR EFEKTIVIGI TIUN KURSON, POR MONATA SALAJRO DE Ĉ. 100 000 PESETOJ. Necesaj kondiĉoj estas granda pedagogia sperto (oni instruos, krom la lingvo, kiel ĝin instrui!), kono de la hispana kaj preferinde de la angla lingvoj. La daŭro de la dungiĝo kaj detaloj estas interkonsentotaj en unu en la laborlingvoj ĉe la suba adreso:

CLIVE POSFORD, Coordinator of AGO project in Spain, Amigos de GAIA, Apdo. 1248, Granada, Hispanio.

ILEI-Konferenco en 1990



Korespondado tra la lastaj jaroj inter Kuba Esperanto-Asocio kaj nia prezidanto pretigas la vojon por nia unua ekster-Eŭropa ILEI-Konferenco. Du nomoj estas proponitaj por la kerno de LKK; tiuj estas prezidanto s-ro Andrés Piñera Prieto (kiu estas Sekretario pri Edukado en Kuba E-Asocio) kaj sekretario/kasisto s-ro Pedro Fernández Rodriguez.

En letero de la 21a de februaro 1989, la prezidanto de Kuba E-Asocio skribas: 'Ĉi-kune ni sendas al vi oferton de la turisma agentejo 'Cubatur' por la ILEI-Konferenco. La proponita sidejo *Hotelo Hanabanilla* troviĝas meze de nia insulo sur la montoĉeno *Escambray*, ĉe la lago Hanabanilla. Pro ĝia alteco la klimato eĉ somere estas agrabla kaj la ĉirkaŭanta natura pejzaĝo estas raviga kaj impona. Ni konsideras, ke tiu alloga kaj trankvila loko estas la plej taŭga por viaj laboroj. Ĝi troviĝas ĉ. 300 kilometroj for de Havano.

Ĉi-momente oni konstruas tie du klasĉambrojn, kiujn vi certe utiligos dum via konferenco. Baldaŭ oni inaŭguros la hotelon *Internacia Esperanto-Centro* kie regos esperanta etoso. En la provinco *Villa Clara*, kie troviĝas la hotelo, nia asocio havas la plej entuziasman kaj viglan esperantistaron, kiun certe vi neniam forgesos pro ĝia gastameco.'

La dokumento de 'Cubatur' indikas, ke la hotelo havas 125 dulitajn ĉambrojn, klimatizitajn, ĉiu kun radio kaj banĉambro. Ĉiu etaĝo havas televidilon. La hotelo mem havas restoracion, baron, naĝejon kaj kabaredan salonon, kiun oni povas uzi tage por laborkunsidoj. Plia restoracio 'Rio Negro' estas atingebla per dekminuta motorboata veturo, kaj tie oni ofertas tradiciajn kubajn manĝaĵojn.

Ilia oferto inkluzivas **du** tranoktojn en Havano, 5 en *Hanabanilla*, bonvenigajn aranĝojn, transporton flughaveno - Havana - Hanabanilla - Havana - flughaveno, fakan viziton, laborkunsidojn, matenmanĝon kaj unu plian manĝon tage. Tion ili proponas je 44 germanaj markoj tage (aŭ 55 por unulita ĉambro).

Tamen tiu restas ankoraŭ oferto, kaj definitiva decido kaj kotizo restas antaŭ ni. Nek dato nek konferenca temo estas fiksitaj ankoraŭ, laŭ la scio de la redakcio. Ni esperas raporti informojn pri tio, kaj pri flug-karavanoj, kiel eble plej baldaŭ.

Rezultoj de la ILEI-enketado

KIE NI LERNAS TRA LA MONDO

En numero 1988/3 de *IPR* ni aperigis demandilon por trovi, kie en la mondo oni instruas Esperanton en elementaj kaj mezgradaj lernejoj. Ni aperigas ĉi tie la rezultojn, kiuj atingis nin pri 83 klasoj en 19 landoj, krom Hungario, kiun ni nur tabele prezentas. Tiuj rezultoj estas certe tre malkompletaj (nur en Hungario ni havas pli pli da klasoj ol tio). Sed ni lanĉis komencon. Ĉi-jare, ni ne komencos de nulo, kaj post kelkaj jaroj ni esperas havi preskaŭ kompletan superrigardon, kun la helpo de ILEI-sekciestroj kaj Landaj Asocioj. Ĉiu devas kutimiĝi, ke septembro estas la monato, en kiu oni informu sian landan instancon kaj ILEI pri ĉiu lerneja klaso.

Ni pli frue aperigis eĉ malpli kompletan rezulton en *Juna amiko*, 89/2 por ebligi uzon de la listo por starigi interklasan korespondadon kaj kontakton dum la priraportata lerneja jaro. Pro spaco-manko ni devas doni la rezultojn per etaj literoj kaj en koda formo. Jen la vicordo de la informoj: Lando; Urbo; Lerneja nomo; Lerneja adreso; Nomo de instruisto; profesia?; dungita?; Nombro de lernantoj; Aĝo de lernantoj; oficialeco; Daŭro de kurso; Studhoroj entute; studhoroj semajne; Uzata lernolibro; Ekzameno; Cetero.

Aŭstrio

Laŭ la sekciestro de ILEI, ne okazis lerneja instruado en 1988/89.

Belgio

Antverpeno; Stedelijk Leergangen voor Talen (Oficialaj urbaj lingo-kursoj); Quellenstr. 31B, B-2000 Antwerpen; STAES, André; jes; jes; 10; ekde 24-jaraj; oficiala 3-jara kurso; sep88-jun89; 150 horoj; 5 h/sem.; 'Tra la labirinto de la gramatiko' (Faulhaber); oficiala ekzameno.

Charleroi; Ecole Bosquetville; DESTABELLE, Roger kaj DELFORGE, Marcel, 16 rue des Glaciers, B-6001 Charleroi; ne; ne; 10; ekde 40-jaraj; hobia; sep88-jun89; 40 horoj; 2 h/sem.; 'Initiation Theorique et Pratique (Denoel); sen ekzameno.

Leuven; Parideaens; Damiaanplein 9, B-3000 Leuven; RAEYNAEKERS, Joris; jes; jes; 5; 14-jaraj; hobia, nedeviga; okt88-jun89; 30 horoj; 1 h/sem.; 'Gerda malaperis' (Piron); sen ekzameno; La lernantoj deziras korespondi tutmonde.

Welkenraedt; Urba kulturcentro; GRELA, Marie kaj Willy, rue de la Colline 16, B-4840 Welkenraedt; jes; ne; 6; 11—50-jaraj; 3-jara kurso; 100 horoj jare; 90 min./sem.; 'Junulkurso' (SAT); 'Nouveau cours rationnel d'Espéranto' (SAT-amikaro), 'Nouveau cours d'Espéranto' (Ludwig-Triolle); sen ekzameno; En 1988 ili organizis unusemajnan staĝon kun helpo de afrikanoj subvenciataj de Unesko; ili ripetos tion en 1989.

Brazilo

Gama; Eduka Centro n-ro 2 (guberniestra lernejo), Quadra 30, Casa 7, Setor Oeste, Gama, BR-72400 Brasilia (DF); Josias Ferreira Barboza, Jes. Jes. 20. 17–19-jaraj. marnov89. 5h/sem., 160 entute. Sen lernolibro, rol-ludoj kreitaj de la instruisto uzatas. Sen ekzameno.

Rio de Janeiro; Kurso de Kooperativo de Esperantistoj, Str. D. Claudina, 100, apt. 402, Meier, BR-20721 Rio de Janeiro (RJ). S-ino Elma do Nascimento; ne; jes; 36; 18-ĝis 50-jaraj; nedeviga; mar-maj89. 4h/sem. 'Baza kaj Konversacia Kurso' (Jair Salles). Ekzameno neoficiala.

Britio

Chippenham; Sheldon School; JONES, Malcolm, 41 Causeway, Chippenham, SN15 3DD, Wiltshire; jes; jes; 6; 12–15-jaraj; hobia; sep88- ; 30 min./sem.; 'Jen nia mondo' (Wells), 'Juna amiko' k.a.; sen ekzamenoj.

Horsham; Forest Community School; FEATHERSTONE, David, 121 Limpsfield Rd, S. Croydon, CR2 9LF; jes; jes; 8; 16–74-jaroj; oficiala; okt88-apr89; 40 horoj; 2 h/sem.; 'Teach yourself Esperanto' (Wells); Ekzameno de EAB proponata; La sama instruisto gvidos nedevigan kurson en Londono prepare al la nova ŝtata ekzameno GCSE (Ĝenerala Atestilo de Mezgrada Edukado) laŭ kiu Esperanto estas ekzamen-objekto.

Penrith; Ullswater High School; THOMPSON, Stephen, Garth View, Bolton, Applebby-in-Westmorland, Cumbria, CA16 6AL; jes; jes; 5; 13-jaraj; hobia; sep87- ; 3-jara kurso; 1 h./sem.; 'Practical Course in Esperanto' (Szilagyi); oficiala ekzameno eblas; La instruisto ne promesas respondi al individuaj leteroj aŭ korespondpetoj.

Salford; Salford College of Technology, Frederick Rd, Salford, M6 6PU; GUBBINS, Paul; jes; jes; 8; 18–20-jaraj; hobia; sep88- ; 2-jara kurso; 30 horoj jare; 1 h/sem.; Artikoloj el 'Monato'.

Winscome; Sidcot School, CURTIS, David, 7 St. Jude's Tce, Weston-super-Mare, BS22 8HB; jes; jes; unu (sed dek venontjare); 18-jara; oficiala; sep88-jul89; 90 horoj; 3h/sem.; cele al la nova GCSE-ekzameno.

York; York Sixth Form College, Tadcaster Rd., York, Nth. Yorkshire; IBBOTSON, John; jes; ne; 7; 16-jaraj; oficiala; sep88-jun89; 1-jara; 80 horoj; 2 h/sem.; propran materialon; ŝtata GCSE-ekzameno.

Bulgario

Gabrovo; Elementa lernejo 'Janko Kolev'; KANCEVA, Nadejda Ivanova, str. Alexo Bogoridi 1, BG-5300 Gabrovo; jes; jes; 25; 6–8-jaraj; nedeviga; okt88-jun89; 66 horoj; 2h/sem.; ekzercaro de Neno Janev; sen ekzameno.

Ĉeĥoslovakio

Budišov, 'Junes' DPM, N.B. 690, CS-747-87 Budišov; DOHNAL Karel; ne; ne; 9; 11–19-jaraj; nedeviga; okt88-jun89; 50-80 horoj; 1-2 h/sem.; 'ABC-lernolibro'; sen ekzameno.

Námestovo, Pionirdomo, str. Fučikova 121, CS-029-01 Námestovo; DVORAKOVA, Anna; ne; jes; 13; 10–32-jaraj; nedeviga; okt88-jun89; 66 hroj; 2h/sem.; rekta metodo sen lernolibro; sen ekzameno.

Pardubice, Sindikatejo de uzino TESLA; RYZNAKOVA, Jarmila, Na Okrouhliku 953, CS-530-03 Pardubice; ne; ne; 10; 12–16-jaraj; hobia; okt-jun ĉiujare, kelkaj studentoj jam 6 jarojn sekvas la kurso; 70 horoj/jare; 2 h/sem.; Lernolibro de L. Prachar, nova slovaka internacia lernolibro 'Esperanto Esperante', 'Domilingo'; neoficiala ekzameno kun diplomoj; Kursoj por plenkreskuloj okazas ankaŭ en TESLA.

Poprad, Int. Kultura kaj Kleriga Centro de SEA, Sobotské nám 6, CS-058-01 Poprad; RYBIN, Milos kaj ZACHARIAS, Anton; ne; jes; 30 en du grupoj; plenkreskuloj; hobia; sep88-feb89; 120 horoj; 6 h/sem.; rekta metodo; SEA-ekzameno; samloke trinivela intensa somera kurso komence de julio por 120 plenkreskuloj; 13-taga kun 50 horoj.

Zilina, Stredna Priemyselna Skola Stavebna, tr. Obrancov Mierv 25/5, CS-010 01 Zilina; FEIFICOVA, Magda; ne; ne; 7; 16–18-jaraj; hobia; okt88 -jun89; 2 h/sem.; rekta metodo; neoficiala ekzameno.

Ĉinio

Tonghua, Tonghua-a Normala Instituto, 156 Toudaogoulu, Tonghua, Jilin-provinco; YU, Dequan; jes; jes; 269; 20–22-jaraj; nedeviga; mar88 -jun89; 92 horoj; 2 h/sem.; 'Lernolibro de Esperanto' kaj 'Esperanto-kurso por memlernado'; oficiala ekzameno.

Finnlando

Tampere, Lentavanniemen ala-aste; HAMALAINEN, Sylvia, Teivaalantie 85, SF-33400 Tampere; jes; jes; 4; 12-jaraj; hobia; aug88-maj89; 35 horoj; 1 h/sem.; 'Tom kaj Tina'; sen ekzameno.

Francio

Besancon, Esperanto-Asocio, 92 rue des Granges, F-25000 Besancon; s-ro COULON, s-ino POUX; jes-ne; ne-ne; 7; ekde 20-jaraj; hobia; okt88- jul89; 60 horoj; 2 h/sem.; 'Karlo' (Privat), 'Metodo 11' (UFE); sen ekzameno.

Noyant, Ecole Primaire Publique, CES, F-49490 Noyant; NAULET Paulette; jes; ne; 37; 9–13-jaraj en du grupoj; hobia; okt88-jun89; 1 h/sem.; 'Junulkurso' (SAT); oficiala unuagrada ekzameno.

Vierzon, Chemin des Erables, F-18100 Vierzon; CAHOUET, Raulo; ne; ne; 10; 45–65-jaraj; hobia; sep88-jun89; 1 h/sem.; oficiala ekzameno.

Villefranche-sur-Saone: ni esperas, ke la kvar klasoj kaj 120 studentoj oficiale funkcintaj dum pluraj jaroj ĝis 1988, daŭras en 1989. Vidu detalojn en 'Juna amiko' 1988/2, p.23.

Germana DR

Schwerin, Popola Altlernejo, Volkshochshule 'Elm Welk', Steinstr. 23, DDR-2754 Schwerin; GERARD Ingrid; ne; jes; 32; 18–65-jaraj; hobia; mar88-jun88 kaj okt88-feb89; 30 horoj; po 2h/sem por du niveloj; Lernolibro de Dahlenburg kaj Liebig; sen ekzameno.

Wittenberg, Hans-Lorbeer-Oberschule, Str. d. DSF 128, DDR-4600 Wittenberg; Heide POHL. jes; jes; 15; 6–17-jaraj; Laborgrupo; sep88- jun89. 1h/sem. Sen lernolibro, instruista materialo. Sen ekzameno.

Hungario:

Vidu la apudan tabelon. La sumo de 2551 lernantoj komparas kun 3286 en la antaŭa jaro. La plena statistiko estas 15-paĝa kaj distingas kvin kategoriojn de klasoj (du oficialaj, tri ne) kaj donas disdividon laŭ la 19 provincoj. La eduka komisiono de HEA akiras tiujn statistikajn informojn ĉiujare en septembro kaj ĝis decembro diskontigas la rezultojn. Jen dezirinda modelo!

Italio

Livorno, Lernejo 'Carlo Collodi'. via di Salviano 87; NERI, Lami Lidia, via A. Gramsci 92, I-57125 Livorno; jes; jes; 19; 8-jaraj; oficiala kaj deviga; okt88-maj89; 60 horoj; 2 h/sem.; Domiling, 'Juna amiko'; sen ekzameno.

Massa, Lernejoj Villette A, Villette B kaj Infaneta Lernejo (5 klasoj); BERTOZZI, De Angeli Jonne, S-ino, Via Quercioli 114, I-54100 Massa; jes; estis; 14+15+12+20+30; 7–9-jaraj, la lasta

RESUMO DE INSTRUADO EN HUNGARIO 1988/89

Nivelo	Oficialaj Kursoj	Kursoj entute	Oficialaj lernantoj	Lernantoj entute
Elementa (6–10-jaraj):	6	32	199	475
Elementa (10–14-jaraj):	13	66	234	861
Mezlernejo (14–18-jaraj):	4	17	82	187
Universitatoj, k.s.:	4	8	80	102
Plenskreska edukado:	–	33	–	361
Korespondaj/intensaj kursoj:	–	–	–	565
Sume	27	156	595	2551

3—5-jaraj; oficala, deviga; okt88-jun89; 85,90,85,90 kaj 30 horoj resp.; 3,4,3,4 kaj 1 h/sem. resp.; 'Esperanto 1' (Szerdahelyi), kajeroj, 'Juna amiko'.; oficialaj ekzamenoj en 4 el la klasoj.

Jugoslavio

Beograd, 'Jovan Sterija Popovic' Osnovna škola (elementa lernejo), ulica Vojvodjanska br. 61, YU-11000 Beograd. Vera ŠORMAZ; jes; nesciate; 30; 11—12-jaraj; nedeviga; sep88-maj89; 1h/sem. 'Zagreba metodo' kaj lernolibro de Sredič. Sen ekzameno.

Beograd, 'Petar Petrovic Njegos' Osnovna škola, General Zdanova 61, YU-11000 Beograd. Velibor SIMOVIĆ; jes; ne; 10; 10—13-jaraj; nedeviga; okt88-jun89; 1h/sem. Propra materialo kaj 'La konversacia literaturo'. Sen ekzameno.

Beograd, 'Djuro Djakovič' osnovna škola, ul. Francuska 26, YU-11000 Beograd; Ruzica RADVANOVIĆ, jes; nesciante; 10; 13-jaraj; nedeviga; sep88-maj89; 1h/sem. Libro de T. Sekelj. Sen ekzameno. Beograda televido vizitis la kurson.

Beograd, Naturscienca kaj Matematika Lernejo 'V. Ilič Lenin', General Zdanova 58, YU-11000 Beograd; R. MAKSIMOVIĆ; jes; jes; 5; 16-jaraj; nedeviga; okt88-apr89; 1h/sem. 'Zagreba metodo'; oficiala ekzameno.

Beograd, Oka Gimnazio, II Bulevar 169/38, YU-11070 N. Beograd; Mirjana ŠUNDEKA; jes; jes; 6; 17-jaraj; okt88-jun89; 2h/sem. 'Zagreba metodo', 'A. Sekelj'. Duonoficiala ekzameno.

Beograd, Sesa Gimazio, Milana Rakica 33, YU-11000 Beograd; Branko DESPOTOVIĆ; jes; jes; 12; 14—18-jaraj; nedeviga; sep88-maj89; 1h/sem. 'Zagreba metodo', sen ekzameno.

Beograd, Dua gimnazio 'Ivo Lola Ribar', Kamenička 1-3, YU-11000 Beograd; Miodrag KOCIĆ; jes; nesciate; 12; 16-jaraj; nov88-feb89; nedeviga; 3h/sem. 'Zagreba metodo', 'La konversacia literaturo', oficiala ekzameno.

Beograd, Supera ekonomia kaj kibernetika lernejo, ul. 27 marta 149, YU-11000 Beograd; Pribislav MARINKOVIĆ; jes; jes; 20; 19—20-jaroj; okt88 -jan89; nedeviga; 2h/sem. 'Zagreba metodo'.

Beograd - Herceg Stepanaj, 'I Proleterskabrigada' osnovna škola; Terezija KAPISTA, Studentska 39/23, YU-11070 Novi Beograd; 16; 12—15-jaraj; ses monata kurso, 48 horoj entute; hobia; Cseh-metodo kaj Zagreba metodo. Ekzameno.

Beograd-Kaludjerica, 'Aleksa Šantič' osnovna škola, Broisa Kidriča 9, YU-11050 Beograd; Zoran ĈEPURAC; jes; nesciate; 20; 9—12-jaraj; nedeviga; jan-jun88; 2h/sem. 'Zagreba metodo', 'Sredič'.

Beograd-Krnjača, 'Zaga Malivuk', ul. Grga Andrijanovič 18, YU-11210 Beograd-Krnjača; Rajko PAVLOVIĆ; jes; jes; 6; 11—12-jaraj; 1 h/sem.; nedeviga; 'Zagreba metodo'. Sen ekzameno.

Čačak, 'Milica Palvovic' osnovna škola, 29 novembra 14, Čačak; tri instruistoj; ne; ne; 12; 12—14-jaraj; nedeviga, dec88-jun89; 1h/sem. 'Zagreba metodo'; oficiala ekzameno.

Novo Selo, 'Bane Milenkovic' osnovna škola u Novom Selu, YU-36210 Vrnjačka Banja; Vladimir DUROVIĆ; jes; nesciate; 14; 12-jaraj; okt88-maj89; nedeviga; 1h/sem. 'Internacia Lingvo' (Ivanovic), 'Esperanto' (Szerdahelyi), 'Zagreba metodo'.


Obrenovac, Skolski Centar '27 mart', Fino Milena KOČOVIĆ, II Bulevar 34, YU-11070 Novi Beograd; jes; jes; 6; 16—17-jaraj; nedeviga; jan-jun89; 2h/sem. 'Internacia Lingvo', 'Zagreba metodo'. Sen ekzameno.

Pirot, 'Vuk Karaĝič' elementa lernejo, str. Maršala Tita 111/1, YU-18300 Pirot; Ciric Mile; jes; nesciate; 15; 13-jaraj; nedeviga; okt88-jun89; 1h/sem. Lernolibro de A. Sekelj. Oficiala ekzameno. En ĉi tiu lernejo okazis pli ol cent kursoj regule de post 1958, kun proks. 10.000 kursanoj.

Vlaška, 'Bora Lazič', YU-11406 s. Vlaška; Dušan Grujič; jes; jes; 35; 9—14-jaraj; nedeviga; okt88-jun89, 1h/sem. 'Zagreba metodo' kaj kurso el gazeto 'Neven'. Neoficiala ekzameno.

Vrnjačka Banja, Esperanto-organizacija 'Čajka', YU-36210 Vrnjačka Banja; Vladimir DUROVIĆ; jes; nesciate; 12; 13—16-jaraj; dec88-maj89; nedeviga; 2h/sem. 'Ivanovič', 'Szerdahelyi', 'Zagreba metodo'.

Zagreb Internacia Kultura Servo (IKS) prizorgas naŭ neoficialajn, libervolajn kursojn en elementaj lernejoj: 'Gustav Krklec', Travno, YU-41020 Zagreb; Ankica BENČEK; jes; jes; 10; 12-jaraj; sep88-jun89; 2h./sem. 'Zagreba metodo', ekzameno kun atestilo. * 'Mladost', Utrine, YU-41020 Zagreb; Marija JERKOVIĆ; nombro de kursanoj nesciata. * 'Josip Kraš', Školski prilaz bb, YU-41020 Zagreb-Dugave; 15 kursanoj. * 'Miroslav Mrkša', YU-414020 Zagreb-Klara; 12 kursanoj. * 'Veljko Vlahovič' YU-41410 Velika Gorica; Zdenka SVETLIČIĆ; jes; ne; 14. * 'Nikola Luketič Kozarčanin', Strma cesta,



YU-41410 Velika Gorica; Marija BELOŠEVIĆ; jes; ne; 13. * '25 maj', Kruge bb.; M. BELOŠEVIĆ; jes; ne; 9. * 'Miroslav Krleza', Kaptol 16, YU-41000 Zagreb; Davorka VELA; ne; jes; 10. *'Branko Čopič', YU-41020 Zagreb-Sloboština; Davorka BAREŠIĆ; jes; jes; 12.

Zemun, lernejo por blindaj kaj duonblindaj infanoj 'Veljko Ramadanovič', Cara Dušana 143, YU-11080 Zemun; Etelka KIŠJAKUPOVIĆ; 9; 14—17-jaraj; nedeviga; okt88-jun89; 1h/sem. 'Cseh-metodo' kaj 'Karlo'; sen ekzameno. De post 1949 okazis tie ĉ. 50 kursoj kun pli ol 500 kursanoj.

Zemun, 'Petar Kočič' osnovna škola, ulica Prvomajska 79, YU-11080 Zemun; GAVRIĆ Zorica; jes; nesciate; 10; 8—9-jaraj; nedeviga; okt88-jun89; 1h/sem. Sen lernolibro kaj ekzameno.

Luksemburgo

Esch/Alzette, Elementa lernejo Brill; PARINI, Pierre; jes; ne; 7; plenkreskuloj; hobia; okt88-maj89; 45 horoj; 90 min./sem.; 'Tachenlehrbuch Esperanto' (Leipzig); sen ekzameno.

Nederlando

Heemskerk, 'Sint Joseph', Postbus 78, NL-1960 AB Heemskerk; VERWOERD, A.J.; jes; jes; 19 infanoj kaj 4 instruistoj; 10—12-jaraj; hobia; sep88-jul89; 30 horoj; 45 min./sem.; 'Sub la verda standardo' (Korte); sen ekzameno.

Pollando

Tychy, Szkola Podstawowa (Elementa lernejo) n-ro 40, ul. Zgrzebnicka 45; MAMOK Krystyna; jes; ne; 53 en 3 grupoj; a11—13-jaraj; hobia; okt88-jun89; 60 horoj por ĉiu grupo; 2 h./sem.; 'Esperanto'(Pettyn); oficiala ekzameno; volas korespondi tutmonde kaj ricevi revuojn, insignojn ktp. por ekspozicio.

Varsovio, Internacia Kulturdomo pri Danco; JANKOVSKA Teresa, ul. Iwicka 40 m. 18, PL-00-735 Warszawa; ne; jes; 46 en du grupoj; 6—8- kaj 8—12-jaraj; deviga por tiuj, kiuj volas eniri la ensemblon; okt88-jun89; 72 horoj; 2 h/sem. por ĉiu grupo; 'Esperanto 1' (Szerdahelyi), 'Juna amiko', 'Skolta mondo'; sen ekzameno.

Wasilkow, Szkola Podstawowa n-ro 2, ul. Polina 1A, PL-16-010 Wasilkow, BARSZCZEWSKA Grazyna; jes; jes; 73 en 3 klasoj; 13-jaraj; oficala kaj deviga; 2-jara kurso ekde sep88; 70 horoj jare; 2h/sem.; 'Esperanto dla karzdego' (Biedulski); sen ekzameno. Krome funkcias du rondoj, unu por dek du 10—11-jaruloj, alia por 5 14-jaruloj, kiuj estas devigaj por tiuj, kiuj elektas ilin, 1 h/sem., sen ekzameno, uzas 'Juna amiko', 'ICEM-bulteno'.

Portugalio

Lisbono, PEA, Rua Damaseeno Montivio, 21-B, P-1100 Lisboa; SANTOS Joao; ne; ne; 15 en tri grupoj; 13—70-jaraj; hobia; okt88-maj89; 52 horoj; 90 min./sem.; 'Nova amiko inter ni', 'Faktoj kaj fantazioj' (Boulton), 'Pašoj al plena posedo' (Auld); neoficiala ekzameno; Oni deziras oferti internacian ekzamenon en Portugalio, pre-

cipe por instruistoj – kiam pretos la UEA/ILEI-ekzamena libreto, tio eblos.

Sovet-unio

Baku, Urba mezlernejo n-ro 160, MIRZOJEV Akif, ul. Aga-Nejmatulla 22, kv. 23, SU-370145 Baku; ne; ne; 7; 14-jaraj; hobia; unujara kurso ekde jan88; 50 horoj; 1 h/sem.; 'Lernolibro de Esperanto' (Semjonova, Isajev); neoficiala ekzameno.

Barnaulo, Lernejo 102, MAKOVJEJ, Nikolao, E-grupo, Ab. jaŝ 2040, SU-656064 Barnaul; ne; ne; 15; 11–14-jaroj; hobia; okt88-jun89; 120 horoj; 4h/sem.; (Semjnova, Isajev); ekzameno.

Jelec, Mezlernejo 22, u. Jelec, Kostenko 49, kv. 32, SU-399740 Jelec; BELINSKAJA Ludmila Ivanova; ne; ne; 12; 14–16-jaraj; hobia; 1 jaro ekde nov88; 90 horoj; 2h/sem.; 'Baza legolibro por komencantoj' (Benczik), 'Juna amiko'; neoficiala ekzameno.

Jonava, Laima KRIVICKIENE, a.d. 24, SU-235000 Jonava 1, Litovio; ne; ne; 15; 14–17-jaraj; hobia; okt88-apr89; 2h/sem. Neoficiala ekzameno.

Klaipeda, Pionira domo, E-klubo, p.k. 179, Klaipeda, Litovio, SU; JAKŜTIENE Vilija; jes; jes; 16; 11–18-jaraj; hobia; sep88-jun89; 144 horoj; 2 x 2h./sem.; 'Esperanto 1' (Szerdahelyi); oficiala ekzameno kun diplomo.

Kohtla-Jarve, 1a Mezlernejo, Katse str. 2, SU-202020 Kohtla-Jarve 8; JOUMEES Lehho; jes; ne; 7; 16-jaraj; hobia; nov87-maj90; 90 horoj/jare; 1 ĝis 2 h./sem.; 'Esperanto Keele Opik' (Ojalo); sen ekzameno.

Leningrado, Lernejo 81, pr. Marisa Toreza d. 13, kv. 4, SU-194021 Leningrad; RYBAK Eleonora; jes; ne; 22; 10–13-jaraj plus du instruistoj kaj kvar plenkreskuloj; nedeviga; ekde nov88; 2 x 2h/sem.; 'Esperanto 1' (Szerdahelyi); ekzameno.

Moskvo, Amikeca klubo, ŜOROĤOVA, Nataŝa, p.k. 36, SU-142717 Moskva; jes; jes; 35; ekde 14-jaraj; hobia; sinsekvaj 3-monataj kursoj, ĉiu kun 30 horoj, 2h./sem.; sen ekzameno.

Murmansk, Mezlernejo n-ro 2, pr. Lenina 101-26, SU-183038 Murmansk; MASJUKAS Alexsandras; ne; ne; 10; 15-jaraj; hobia; okt88-apr89; 25 horoj; 1 h/sem.; (Semjonova kaj Isajev), 'Taschenlehrbuch Esperanto' (Dahlenberg), (Makaov, Valev, Satafor – Sofio); sen ekzameno.

Vladimir, Klubo; VALILJEVA Svetlana, ul. Gastelo 4-36, SU-600026 Vladimir; ne; ne; 7; 14–18-jaraj; hobia; 3 monatoj ekde okt88; 52 horoj; 4 h/sem.; (Seĉgeev; Semjnova kaj Isajev); neoficiala ekzameno.

Svedio

Karlskoga, Karlskoga Popola Altlernejo, Box 192, S-69124 Karlskoga; FORSMAN Lars; jes; jes; 10-15 diversaĝaj studentoj en ĉiu kurso; sinsekvaj ok-semajnaj kursoj: komencantoj en jan. kaj aug. 89, progresantoj mar. kaj okt. 89; intensiva unu-semajna kurso 3a ĝis 7a de julio 1989; 8-semajnaj kursoj havas 200 stud-horojn; oficialaj; sen ekzameno. Kursoj malfermaj al svedoj kaj eksterlandanoj; surloka loĝigo kaj manĝado proponata.

Svislando

Le Locle, Ecole Secondaire du Locle, Rue de l'Hotel-de-Ville 5, CH-2400 Le Locle; GROSJEAN-ROBERT, Mireille; jes; jes; nombro ne indikita; 11–14-jaraj; elektebla el inter 35 kursoj, deviga post elekto; aug88- jun89; 90 min./sem.; sen ekzameno.

Jen nia resumo. Vi rimarkos, ke signifa kvanto de la kursoj estas fakte por plenkreskuloj, kaj la plimulto estas neoficialaj. Se ni ellasos la hungarajn ciferojn momente; ni ricevis raportojn pri ĉ. 1450 lernantoj, el kiuj ĉ. mil estas lernejanoj kaj 450 plenkreskuloj; 350 studas oficiale, 1100 hobie. El la 83 kursoj, 61 estas neoficialaj, 22 oficialaj. Certe niaj rezultoj estas tre nekompletaj, estonte ni provos kunlabori pli rekte kun la ILEI-sekcioj en la

kompilado de statistikoj, ĉiujare en septembro. Ni apartigos la statistikadon de lerneja kaj plenkreska lernado.

Ni supozas, ke la plimulto de la instruistoj kaj lernantoj menciitaj supre volonte starigos internaciajn kontaktojn, do kuraĝu kontakti unu aŭ du el ili! Tiel via Esperanto-kurso povos alpreni multe pli da senco kaj havi praktikan sekvon. Super ĉio, bonvolu reagi unuope kaj land-nivele al nia nova enketo en septembro 1989. Landaj sekcioj kaj asocioj ricevos stokojn da enketiloj, kaj estas petataj alpreni la taskon sisteme mem enketi kaj raporti pri ĉiu instruado sur sia teritorio. La enketilo aperos en la venonta numero de *IPR* kaj en *Juna amiko* 89/3. Ekzempleroj estos akireblaj dum la 'Tago de la Lernejo' en la UK en Brajtono. Redaktoroj de gazetoj, kiuj pretas aperigi la demandilon en septembro povos ricevi prespretan originalon same dum la UK.

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

petas proponi por alvoko kiel profesoroj de AIS sciencistojn, kiuj estas kaj fake elstaraj kaj bonege parolantaj la Internacian Lingvon. En tiuj kazoj la Senato de AIS ricevis de la Ĝenerala Asembleo la rajton, sen postuli la antaŭan plenumon de formalaĵoj, honorige alvoki en la rangon de efektivaj membroj de AIS. Ĉiu, kiu komprenas la Internacian Lingvon almenaŭ skribforme kaj plenumis universitatnivelan studadon almenaŭ 2-jaran (ĝis la ŝtupo de bakalaŭreco) povos akiri la apartenecon al la Internacia Scienca Kolegio de AIS almenaŭ kiel libera ISKano, se li plenigite resendas "pripersonan informilon" por la Internacia Sciencista Dokumentaro. La "simbolan membrokotizon" (jare 4 internaciaj respondkuponoj) transprenas laŭpete en kazo de transpagaj aŭ aliaj malfacilaj\oj la Dr.Klemm-Fonduso.

Skribu al la Prezidenta Sekretariejo de AIS, KleinenbergerWeg 16B, D-4790 Paderborn, Germanio. Kun danko pro via kunlaboremo

OProf. Dr. habil.Helmar G. Frank, prezidanto

Diskuto pri nova komunika moralo

La 7a Ĝenerala Asembleo de AIS decidis publike diskutigi ekde la jaro 1989 eblajn principojn de nova komunikada moralo. La diskuto okazu principe (sed ne nepre nur) en la internacilingva gazetaro kaj radio-elsendaro kaj dum konferencoj en aŭ ekster la E-o-movado.

Unua diskuto de la prezentitaj tezoj okazu kadre de la 6a Sanmarina Universitata Sesio (SUS 6), kiun AIS okazigos de la 27a de aŭgusto ĝis la 4a de

septembro 1989 en San Marino (aliĝo ĉe la ĉi-supra adreso). AIS intencas decidi pri koncernaj rekomendoj eventuale jam fine de SUS 6, sed plej probable 1990. Ĝis nun tri tezoj estas diskutcele proponitaj. Ilin defendas OProf.Dr.habil. Helmar G. Frank MdAIS kiel (ĝis nun) personan opinion sian:

Tri maksimoj de nova moralo pri komunikado

Komunikada moralo konforma al la atingitaĵoj de la kibernetika tekniko kaj al la tuthomara vivkvalito estas skize priskribebla per la jenaj tri principoj:

I. Batalendas – precipe sur la kampoj de arto kaj tekniko – ne nur kontraŭ la polucio de la *natura* (materia) vivmedio, sed ankaŭ – kaj neniel malpli – kontraŭ la polucio de la vivmedio *kultura* (informa). Mallonge: *Kulturprotektado samgravas kiel naturprotektado*. Mi proponas por ĉi tiu unua maksimo la nomon "Maksimo de la evitenda informeca polucio".

II. Pli gravas la evoluigo de la internacia scienca komunikado samrajta cele kunan atingon de *estontaj* progresoj ol miopa, spasma plirapidigo de *nunaj*, unuopaj, specialsciencaj progresoj. Mallonge: *Progresoj por la estonta komunikado pli gravas ol komunikado de nunaj progresoj*. Mi proponas por ĉi tiu dua maksimo la nomon "Maksimo de la prioritato de la komunikada progreso".

III. La internacilingva kulturo, konscia ke *komuniki* signifas *komunigi*, fariĝu pioniro survoje al informeca komunismo, kaj modelo instiganta al la abolicio de la kontraŭkulturaj leĝoj baziĝantaj sur la superstiĉo pri "softa varo". Mallonge: *La kopirajto estas superstiĉa kontraŭkultureco.* Mi proponas por ĉi tiu tria maksimo la nomon "Maksimo de la nemerkatadebleco de la kulturo".

Kiuj estas la supozoj kaj argumentoj, sur kiuj la tri maksimoj baziĝas? Kiajn praktikajn konsekvencojn ili havu? Kiel ili precipe koncernas la kibernetikistojn kaj la ILo-parolantojn?

Al tiuj demandoj Prof. Frank respondis per detala komentario en la Internacia Lingvo dum la TAKIS-konferenco en San Marino, dum la INTERNACIA FESTIVALO en Trier kaj dum la TEJO-konferenco en Traben-Trarbach. La kompleta teksto estas havebla ĉe la ISTITUTO DI CIBERNETICA SAMMARINESE, Via dei Capuccini, RSM-47031, San Marino Città, Respubliko de San Marino (petu la senpagan sendadon de la konferencaktoj "INTERKIBERNETIK 88"). La sama aŭtoro respondis al la samaj tezoj per iomete ŝanĝita komentario en la germana dum prelego en la parlamentejo de Eupen. La kompleta germanlingva teksto kun detala internacilingva resumo troviĝas en la libro eldonita de OProf. Karl SCHICK dr. MdAIS: "Kommunikation – mit Rechnern, ohne Rechner, durch Rechner", eldonejo Verlag modernes Lernen Borgmann KG, Dortmund, 1989, DM 14.70.

Zang Danchen, Gong Wai Xi, Shifan Daxue, Wuhan, Huazhong, Ĉinio — Evoluo kaj fondo de sekcioj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko.

HONORAJ MEMBROJ

Zlatnar Peter (YU, 1984) – Dazzini Mario (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986) Klemola Irja (SF, 1986) – Olsson Olle (S, 1986) – Toczyński Jozef (PL, 1986) Sonnabend Helmut (D, 1987) – Dazzini Catina (I, 1988) – Szerdahelyi István (H, 1988)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino : Alfredo Juan Valle, Santa Fé 497, RA-1708 Morón (B.A.)
Aŭstrujo : Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgujo : Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1710 Dilbeek
Brazilio : Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britujo : Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 82D
Ĉeĥio : Vêra Barandovska, Volgogradská 41, CS-70400 Ostrava 3
Ĉinujo : Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal University, 430070 Wuhan, PR China
Finnujo : Pentti Järvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
Francujo : Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim
F.R. Germanujo: Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, D-8900 Augsburg
Germana D.R.: Till-Dietrich Dahlenburg, Str. der DSF 13, DDR-2722 Brüel
Hispanujo : Manuel López Hernández, Sol 75, E-41003 Sevilla
Hungarujo: : Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo : David Mager, P.K. 4246, IL-84142 Beer-Ŝeva
Italujo : Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanujo : Toi Kunio, 1448-1 Simotakajyanagi, Kazo-si, Saitama 347
Jugoslavio : Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
Korea Resp. : Gilsu So, Sodaemun, P.K. 59, Seoul-120
Nederlando : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko : Ian Richmond, 66 Naomee Cres., London, Ont. Canada N6H 3TS
Norvegujo : Åge Melå, Beverstien 2, N-3190 Horten
Pollando : Tadeusz Ejsmont, ul. B. Bartoka 1 m 49, PL-92 547 Łódź
Portugalio : Alexandre Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
Sanmarino : Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 San Marino
Slovakio : Růzena Vojtechová, Bytovky blok "B", CS-05960 Tatavanská Lomnica
Sovet-Unio : Palu Johannes, Solme 21, SU-200016 Tallinn, Estonio
Sud-Afriko : Jape Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522, Suid-Afrika
Svedujo : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby
Svisujo : Edgar Jobin, F.W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle
Venezuelo : J.E. Bachrich, Apartado 3833, YV-1010 A Caracas
Zairio : Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

REPREZENTANTOJ

Bangladeŝo : Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Centrafrika Resp. : Luc Feidangai, B.P.960, Bangui
Ĉilio : Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Irano : Mohammad Karamudini, P.O.Box 13445-747, Tehran/Iran
Nigerio : Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Ekpoma Bendel
Tanzanio : Mramba Simba, S.L.P. 1051, Bunda Mara

LABORKOMISIONOJ

Statistiko : Pirlot Germain, Kemmelbergstraat 5, b. 3, B-8400 Oostende
Didaktikaj lud(il)oj : Sossois Georges, rue de la Consolation 2, B-6400 Couvin

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C)
: 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.
Reprezentantoj de ILEI:
Fairbank James, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016 Paris
François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris

UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Kontribuajoj al IPR

sendendaj en du ekzempleroj, tajpitaj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon)

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 40 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby (Svedujo).
2) poŝtĝirkonto: 3789 64 — UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)